



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Decembro 2020 n-ro: 60



Saluton,

Jen! Finiĝas la jaro 2020.

Ĉu la venonta jaro, 2021, estos pli bona jaro?

Ni esperu je tio.

Ni deziras al vi feliĉon, sukceson, prosperon kaj ĉefe sanon en la nova jaro.

Kun ĉi tiu 60-a numero ankaŭ Turka Stelo fariĝas kvin jaraĝa.

Ni komencis publikigi ĝin kune kun vi ekde januaro de 2016 kaj pasis kvin tutaj jaroj ekde tiam.

Ĉiumonate 32 plenplenaj paĝoj por via legado.

Senpaga, elektronika en pdf, epub kaj mobi formatoj.

Multaj homoj legas ĝin ankaŭ en la Sumoo librolegadoj.

Pro via subteno ni dankas al vi, al niaj legantoj, kaj al vi, al niaj kontribuantoj.

Sen legantoj kaj kontribuantoj revuo ne povas ekzisti.

En ĉi tiu numero estas denove interesaj tekstoj por via legado. Ne nur tekstoj sed ankaŭ poemoj, amuzaj rakontoj, ŝercoj, krucvortenigmoj. ktp.


Ĉiumonate la tekstoj venas el 17 diversaj landoj tra la mondo: Albanio, Brazilio, Britio, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Grekio, Hungario, Islando, Kubo, Litovio, Malto, Rusio, Serbio, Turkio, Uzbekio.

Aparte interesaj por vi povas esti la artikolo de Konuralp Sunal en la angulo "Tempo Sigelita" el la mondo de kino, la artikolo de Spiros Sarafian el la greka mitologio: "Penelopa", la artikolo de Carmel Mallia "La Turka Ĉefgalero", la rakonto de Laimundas Abromas "La kunvenoj esperantistaj", la poemtradukaĵo de Adri Pásztor "la kapreoleto de maljuna onjo", la rakonto de Gersi Alfredo Bays "Kredu min samideanoj".

Bonvolu resti hejme kaj legi por protekti vin de la kronviruso, kiu gvas ekster via domo en popolamasaj ejoj.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

| | |
|--|----|
| Malfermo | 1 |
| Enhavtabelo | 2 |
| Kursoj | 2 |
| Maldormemo | 2 |
| Sumoo | 3 |
| UEA | 3 |
| TEJO | 3 |
| Leteroj de niaj legantoj | 4 |
| Ciklo kun Hori Jasuo | 4 |
| Tempo Sigelita | 5 |
| PENELOPA (ΠΗΝΕΛΟΠΗ) | 6 |
| Konkurso Hristo Gorov | 9 |
| Krucvortenigmo | 9 |
| Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo | 10 |
| El la libro de "Dao de Jing" | 11 |
| La motorciklo | 11 |
| La Kimero - Rakonto el la estonteco (7) | 12 |
| Kvarteto | 13 |
| Venelin Mitev - poeto ambasadoro | 13 |
| El la literaturaj paĝoj de MAS | 14 |
| Poeziaĵoj de Ilir Zhiti | 16 |
| Ŝercoj tradukitaj de Antanas Vaitkevičius | 17 |
| Amuza Matematiko | 17 |
| Astrologio - Decembro/Sagitarioj | 18 |
| MEM (1994) | 19 |
| La Turka Ĉefgalero | 20 |
| Du rakontoj pri hundoj | 21 |
| La kunvenoj esperantistaj | 22 |
| Vento de novembro | 24 |
| Ŝercoj | 24 |
| Preĝo de la artisto kaj la poeto (EKRA2020) | 25 |
| La truto marko (EKRA2020) | 25 |
| La kapreoleto de maljuna onjo | 26 |
| Kredu min samideanoj! (1) | 28 |
| HO, HOMARO! (aŭ invito al medito) | 30 |
| Solvo de la krucvortenigmo | 30 |
| Mirinda renkonto (1/10) | 31 |
| Facilaj rakontoj | 32 |

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Participloj
- 13/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Maldormemo

Malvarma blovo tra aperturo fenestra.
Vintra nokto.
Palaj pensoj glitas sur la muroj de la dormoĉambro.
Ombra birdo grumbas proksime, guturale.
Transe, severa silento.
Senpova buŝo silentas.
Varmeta buŝodoro sen vortoj.
Paralizitaj manoj.
Nenia gesto, ĉar senutila.
Ĉi tiun momenton, certe iu almozulo frostmortas ĉe iu stratangulo.
Kiel dormigi senesperon?

poemo de **Paulo Sergio Viana**
el Brazilo



fonto: <https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2020/08/insonia.html>

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 66a Esperanto-Sumoo finiĝis kun granda sukceso. La unua Sumoo okazis en septembro 2009 kun 10

partoprenantoj, sed nun ni havas pli ol 350 partoprenantojn. La 22-an de novembro la 66-a Sumoo finiĝis. Mi ankoraŭ ne povas analizi precize pri tiu ĉi sumoo, sed jene estas notindaj aferoj:

La nombro de la partoprenantoj estis 356. Tiu nombro estas la due plej granda, sekvante la sumoon okazintan en majo 2017 kun 385 partoprenantoj.

Ni havas du kialojn pri tio:

-- Unue multiĝis partoprenantoj el Koreio. Antaŭ la UK en Seulo, koreoj multe partoprenis (102), sed poste la nombro pli kaj pli malgrandiĝis, kaj fine estis nur unu. En tiu ĉi novembra sumoo Ella iniciatis varbadon kaj sukcesis kolekti 33 partoprenantojn. Mi estas tre ĝoja pro ŝia granda laboro.

-- Due multiĝis partoprenantoj el Ĉinio. Ĉinio estas grandega lando, ne nur ekonomie, sed ankaŭ Esperante. S-ino Song, uzante interreton, kolektis 41 partoprenantojn el la tuta Ĉinio. Tio estas ia mirinda laboro.

Pro la epidemio de koronaviruso multaj kongresoj ne okazis. Tio estas granda bato al nia movado. Sed eĉ en tiu situacio, tiu ĉi Esperanto-Sumoo povas okazi sen problemoj kaj multe kuraĝigas esperantistojn.

Per la Sumoo ni antaŭenigu nian movadon!

HORI Jasuo
organizanto de la Sumoo

UEA



N-ro 913 (2020-10-23)
**Mesaĝo de UEA
okaze de la Tago de
Unuiĝintaj Nacioj,
24 oktobro 2020**

[Mesaĝo sendota al UN. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon!]

La 24-a de oktobro, la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, markas la daton en 1945 kiam la Ĉarto de UN ekvalidis kaj UN formale ekestis. Sepdek kvin jarojn poste, ni retrorigardas al tiu tago kiel al unu el la plej grandaj atingoj de la homaro. Per la laboro de Unuiĝintaj Nacioj, kaj kun la kunlaboro de ĝiaj Membraj Ŝtatoj, la mondo faris gigantajn paŝojn al starigo de monda ordo, respekto al homaj rajtoj, konservado de paco kaj antaŭenigo de daŭripova evoluigo. [...]

N-ro 914 (2020-11-03)

CED reorganiziĝas sub nova estraro

La Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) estas branĉo de UEA, fondita en 1952 de Ivo Lapenna, kaj respondecas pri scienca esplorado pri la fenomeno Esperanto, ĝia movado kaj komunumo, kaj ĝia videbligo en sciencaj kaj intelektulaj rondoj ekster la movado. [...]

TEJO



**Partoprenu en
video de TEJO
por la
Zamenhofa Tago**

2020!

La jaro 2020 estis malfacila por multaj homoj tra la mondo kaj ni volas festi la Zamenhofan Tagon kun speciala ĝojo kaj optimismo. Temo de la video: "Mi esperas..." [...]

Komitatkunsido de TEJO

TEJO okazigas la duan retan KomitatKunsidon 2020! Estraranoj kaj komitatanoj kunvenos la 22-an, la 28-an kaj la 29-an de Novembro por diskuti, labori kaj voĉdoni pri multaj gravaj aferoj en TEJO. Ĉiuj membroj de TEJO rajtas partopreni kaj kontribui. Okazos laborgrupoj pri Strategia Plano, Realigplano kaj Buĝeto, kiujn ĉiu membro de TEJO bonvenas ĉeesti. [...]

Egaleco bezonas vin!

La laborgrupo de TEJO pri Egaleco spertas renovigon ĉi-jare kaj bezonas entuziasmajn aktivulojn! Ĝi ekhavis novajn branĉojn, tiel ke ĝi nun konsistas el kvar branĉoj: – Genra Egaleco, – Tutmonda Egaleco, – Alireblo, – Liberen [...]

Ekis la komisiono pri talento

Post kelkajara paŭzo, la komisiono pri Talento reekas sian laboron kun entuziasmaj aktivuloj! Ĉu vi estas nova aktivulo kaj vi ankoraŭ ne trovas vian vojon en TEJO? Ĉu vi ne certas kie via kontribuo estus bezonata aŭ kiun rolon alpreni? Ĉu vi konas promesplenon homon, kiu estus taŭga aktivulo por TEJO? Skribu al tejoofficejo@gmail.com kaj ni helpos vin! [...]



Leteroj de niaj legantoj



Kara elkoran dankon por la novembra Turka Stelo.

Bedaŭrinde via kunlaboranto Ilir Zhiti forpasis antaŭnelonge pro peza malsano.

Tio ege ĉagrenigis min, lian amikon same.

Mi daŭre transendos vian revuon al ties gefiloj.

Baldaŭ mi kompilos artikoleon je lia omaĝo.

Bardhyl Selimi el Albanio



Estimata,

Legante la numeron 59 de Turka Stelo mi rimarkis la artikolon pri Haĉiko. Tio estas tipo de ago de hundo, pri kiu oni konas plurajn okazojn. Unu (du fakte) mi trovis en libro de Jean Prieur kaj esperantigis. Mi sendas ĝin kaj alian artikolon por la venontaj numroj de Turka Stelo.

Kore via,

Roland Platteau el Francio



Dankon pro la revuo, karaj!

Kiel vi fartas? Antaŭ nelonge mi legis pri la tertremo, kiu trafis insulojn kaj urbojn de Grekio kaj Turkio. Kiom terura okazintaĵo. Mi esperas, ke vi fartas bone dum tiu ĉi malfacila tempo. Tutkorajn varmajn bondezirojn al ĉiuj. Amike,

Luiza Carol el Israelo



Karaj amikoj! Dankon pro la sendo de la 59-a numero de "Turka Stelo".

Amike,

Tibor Szabadi el Hungario



Karaj, mi ĵus ricevis la brilan revuon Turka Stelo! Koran dankon!

Ĉu vi fartas bone? Terura tertremo! :(

Amike,

Maria Nazaré Laroca el Brazilio

Karaj gesinjoroj,



Mi ĝuste ricevis vian revueton "Turka Stela" numero 59. Mi estis tre ĝoja kiam mi sciis, ke mia artikolo "Esperanto - Internacia lingvo" estis publikigita en ĉi-tiu numero de la revueto. Mi ne scias kiel priskribi miajn

sentojn. Nur vorto "Koran dankon". Mi deziras al vin multe da sukcesoj kaj sanoj.

Ĝis revido.

Dr. Phung Manh Tien el Vjetnamio

Saluton sinjoroj,



Dankon pro la sendita lasta 59-a numero de TS, kiun mi tralegis kun granda plezuro kaj atente.

Ĝi estas belaspekta kaj interesa. Hodiaŭ mi sendas ankoraŭ unu humuraĵon pri esperantistoj. Se vi trovos ĝin interesa, bonvolu publikigi ĝin sur paĝoj de TS.

Kun estimo, sincere,

Laimundas Abromas el Litovio

Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

Je la parko
knabino kun ĉapelo.
Floroj odoras.



Je la herbejo
kun la karaj nepinoj
Avina ĝojo.
Ili malkovras l' vivon,
ŝi – la ĝojon de l' junec'...



MIA KATETO

Mi havas kateton
kun bela buŝeto
kaj oreletoj
ĉion aŭdantaj.
Kun lipharoj,

kiel bravulo
estas mia gaja
murmuretulo.
Ĉu ludas aŭ kuŝas
mia ruzuleto,
kiel ĉiu kato
liberon ĝi ŝatas.



verkis kaj sendis **Elena Popova**
el Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



A mindaj murdintoj kaj viro, kiu provas reordigi la malbonŝancojn. Komedio en mallumo.



Dum ĉi tiu problema jaro finiĝas mi volis verki pri malpeza filmo. Nu, ĉu estas ĝuste nomi ĉi tiun filmon, kiun mi elektis, malpeza? Mi ne certas. La filmo provas prezenti la okazantajn teruraĵojn kaj la ĉenon de ridigaj eventoj, al komplete vodevila fikcio kaj tempoaranĝo. Luther Davis kreis skipton el



la teatraĵo de Joseph Kesselring. Kaj Frank Capra, la reĝisoro de la optimismaj filmoj, sukcese transdonis ĝin por la granda kino-ekrano. Fakte, se ni ekskludas kelkajn eksterajn scenojn, ĉiuj aliaj scenoj okazas hejme. Ne estus malĝuste nomi ĝin teatraĵo filmita por kino. Iuj ankaŭ nomis ĝin la unua ekzemplo de situa komedio ("sitcom" angle). Sed ĉi tiu filmo havas plenan vodevilan ritmon. La vigleco daŭras ekde la komenco ĝis ĝia fino. Ĉiumomente la

spektantaro alfrontas novan amuzan situacion, novan nodon. En resumo, la temo estas la jena: Fama teatrokritikisto Mortimer Brewster estas konata pro siaj kontraŭgeedziĝaj libroj, kaj en la malferma sceno ni vidas lin atendante en vico por kandidatiĝi ĉe la geedziĝa oficejo kun sia estonta edzino sed tio kaptas la atenton de du raportistoj. Li eskapas de ili, tiel ekigante sinsekvajn malbonŝancojn, surprizojn kaj malfacilajn situaciojn. La juna virino, kun kiu ŝi

edziĝos, estas najbarino de izolita domo en Bruklino, kie loĝas ŝiaj du maljunaj onkloj. La patro de la virino ankaŭ estas pastro. Ironie, ambaŭ domoj estas apud la tombejo. La du maljunulinoj ankaŭ havas fraton: freneza onklo, kiu pensas, ke li estas la prezidanto Roosevelt kaj daŭre, kun trumpeto en la mano li krias "atakuuuu!" kaj trakuras tra la ŝtuparo al sia ĉambro en la supra etaĝo.

La veraj eventoj komenciĝas kiam Mortimer, kiu planas foriri al sia mielmonato, rimarkas korpon en kesto ĉe la domo de siaj onkloj, kie li vizitis. Tamen la onkloj komfortas, konfesante la murdojn, kiujn ili antaŭe faris. Ili venenis entute 12 solulojn maljunulojn kaj enterigis ilin en la subtera etaĝo de la domo kun la helpo de siaj fratoj. Antaŭ ol ili povis enterigi ĉi tiun lastan viktimon, alvenis nia teatrokritikisto, ilia nova juna nevo. Ili diras, ke ili mortigis la homojn, kiuj venis lui ĉambron en sia domo, por savi ilin de soleco, kaj fari al ili bonon. Kaj ili tute ne bedaŭras tion.

Lia nevo Mortimer (Cary Grant) estas konsternita kaj ŝtonigita de ĉi tiuj konfesoj. Unuflanke, lia edzino en la najbara domo kiu iris prepari siajn havaĵojn por la mielmonata vojaĝo, aliflanke la konataj policanoj de la kvartalo, aliflanke la freneza onklo, aliflanke la murdistvizaĝa frato, kiu ŝajnas al aktoro Boris Karloff kaj kiu post jarojn revenis al la domo kie li naskiĝis kaj kreskis, kaj aliflanke ties kunlaboranto nomita D-ro Einstein. Dum nia heroo provas ordigi la situacion, li restas inter ĉi tiuj stranguloj. Do aldoniĝas nodo sur nodo.

La aktoroj estas ĉiuj tre sukcesaj. Sed mi devas substreki la fizikan komediagadon de Cary Grant, kiu agas same al Jerry Lewis. Eble iomete troigita sed tre sukcesa.

Mi memoras ĉi tiun verkon de antaŭ jaroj, en mia infanaĝo, per la nomo "Frambo". Mi spektis ĝin kiel televidan dramon. Mi pensas, ke la nomo "Frambo" originis de la venena framba likvoro farita de la maljunulinoj en la teatraĵo. En la filmo oni uzas vinon. Eble ĝi ankaŭ estis tiel en la teatraĵo, sed mi memoras ĝin kiel "likvoro". La originala Broadway-produktaĵo estis scenigita en la jaro 1941 kaj la filmo estis en 1944. En Turkio, en 2017 la fama teatra artisto Nedim Saban remetis la ludon al la teatra scenejo. Kaj ĝi estis scenigita multfoje antaŭe. Ĝuste tiel, ke mi volis verki malpezan filmartikolon kaj elektis ĉi tiun filmon, la dramisto, poeto Ekrem Reşit Bey, en la 34-a numero de Darülbedayi revuo, en la eksa revuo de Istanbulaj Urbaj Teatroj, diris: "Teatro, kiel oni diras, eĉ se ĝi estas manĝaĵo, ĝi ne konsistiĝu el simpla nigra kaj



Fideleco! Jen vorto unuavide simpla, tamen, postmedite, komplika! Do, "fideleco", eco de persono fidela, sindonema; tamen, fidela al kio? Oni povas esti fidela, do, neŝanceliĝema, firma al kredoj, principoj, opinioj, decidoj k.a., firma malgraŭ malfaciloj, baroj, malfavoraĵoj. Ĉu, do, estimindaj ĉiuj personoj fidelaj al io ajn? Ne, mi ne estas preta subteni tian opinion, ĉar mi pensas, ke povas esti fideleco pro blinda obstineco, pro fanatikeco, pro io simila. kaj ĉar la afero ŝajnas tute ne simpla, mi lasas ĝin al la specialistoj pri psikologio kaj similaj sciencoj, min interesas ĉi tie la fideleco de geedzoj, de geamantoj. Nu, kiam mi pensas pri tio, en mian menson venas nur unu persono, la vaste, ne nur en Helenujo, konata personigo de tiu eco, Penelopa!



Penelopa apartenis al nobla gento de Lacedemono (Λακεδαιμόνων), ŝi estis filino de Ikariono (Ικαρίων), frato de Tindareo (Τινδάρεως), la reĝo de la potenca Sparto (Σπάρτη). Ekde sia infanaĝo ŝi montris ke ŝi estas prudenta, serioza kaj saĝa kaj ankaŭ pro ĉio tio ĉi ŝi estis tre amata al ĉiuj.

Laŭ la kutimoj de la epoko kaj la loko, kiam la knabinoj atingis la duajn jarojn de sia adoleskanteco, estis jam pretaj por edziniĝo. Tiel, kiam Penelopa atingis la ĝustan aĝon, ŝia patro komencis serĉi inter la filoj de la plej konataj noblaj familioj de Helenujo la taŭgan edzon. Tiacele li organizis en sia patrujo foiron kaj atletajn konkursojn al kiuj li invitis la plej konatajn needziĝintajn junajn virojn, la plej taŭgajn kandidatojn.

Inter la multaj alvenintoj estis Odiseo (Οδυσσεύς), la juna reĝo de Itako (Ιθάκη), regnestro tre juna sed tre potenca, viro riĉa, brava, forta, milit-sperta, sed, precipe kaj pro tio vaste konata en la tuta Helenujo, homo eksterordinare inteligenta, sprita, vigl-mensa.

Penelopa, kiu, helpe de siaj fidelaj vartistinoj kaj servistinoj, kaŝe observadis de malproksime la vizitantojn kaj aprezis ilin laŭ la eksteraĵo, ekvidis Odiseon kaj tuj sentis en sia tute pura, virta koro ian

nekonatan konfuzivan tiktakon, ian atakon de pluraj, kompleksaj sentoj, ĝojo, deziro, ĉagreno, alivorte, Penelopa estis fulme enamiĝinta al la bela reĝo de Itako.



Je la fino de la atletaj ludoj, la lastan kurkonkurson kaj la finan ceremonion spektis, starante flanke de sia patro, Penelopa.

Tiun konkurson partoprenis ankaŭ Odiseo, kiu tre facile venkis tre kapablajn konkurantojn. Kiam la konkurs-komisiono aljuĝis al li la venk-kronon, Odiseo senhezite kliniĝis antaŭ Ikariono kaj oferis sian premion al la fulmobatita Penelopa. Tio signis la feliĉan finon de la afero, Odiseo gajnis ankaŭ la plej valoran premion, la manon de la feliĉa Penelopa, kiu post nur kelkaj tagoj iĝis reĝino de Itako.

La reĝa paro estis tre feliĉa, ĉio en la domo fluis glate, en la lando estis etoso je ĉio kontentiga, estis prospero, estis evoluo, paco. La ĝenerala feliĉo atingis sian kulminon, kiam, post unu jaro, Penelopa naskis sian infanon, venigis en la mondon la kron-princon de Itako, kiu ricevis la nomon Telemaĥo (Τηλέμαχος).

La patro de Odiseo, Laerto (Λαέρτης), estis maljuna kaj malsanema, do, li ne sin okupis, li ne plu povis sin okupi, pri la publikaj aferoj, li estis retiriĝinta el la publikaj funkcioj kaj vivis izolite en sia malproksima kampara bieno, kun malmultaj, malnovaj siaj kompanoj kaj servistoj. Tiele, la tuta povo sur ĉio estis devo de Odiseo, kiu estis mastro tre kapabla kaj amata al la popolo.

Penelopa, ebria de feliĉo, vivis en la flanko de sia eksterordinare amata edzo kaj kredis, ke ŝia feliĉo estos eterna. Tamen, unu tagon atingis Itakon la fatala novaĵo pri la granda tuthelena militiro kontraŭ Trojo (Τροία). La vasta patrujo, Helenujo, invitis la plej potencajn suverenojn de la tuta lando, ligitaj inter si per sanktaj, plej fortaj ĵuroj, defendi la honoron kaj la profitojn de la helena gento.

Odiseo, konata en la tuta Helenujo kaj respektata de ĉiuj plej grandaj regnestroj pro lia milit- kaj administr-kapablo, kaj pro lia eksterordinara mens-vigleco, ne povis malesti, do, tute certa, ke li revenos post nelonge, komandante armeon el elektitaj bravaj militistoj, ekŝipiris!

La aferojn de la palaco kaj la ŝtato mastrumis fideluloj de Odiseo. Penelopa, tute sola, kun koro dispremiĝinta, sin okupis nur pri sia infano kaj pri sia domo, ĉiam pensante kaj atendante sian amatan edzon.

Pasis semajnoj, pasis monatoj, jaroj kaj Odiseo ne revenis. La izolitan insulan regnon atingis nur



malmultaj, ne certaj informoj pri milito daŭra, dubafina, kruela, oni parolis pri centoj kaj miloj da mortintoj, kaj la atendo de Penelopa iĝis pli kaj pli turmenta.

Dume, en la lando, kiu restis longe senmastra, anoj de eminentaj familioj iom-post-iome komencis konspiri, komencis disvastigi famojn pri onidira pereco de

Odiseo, ili klopodis maltrankviligi la popolon, kaŭzi konfuzon, favorigi la publikon al la ideo pri instalo de nova reĝo. Tamen, tio estis afero nek de la nobeloj, nek de la popolo, ĉar reĝo vere ne estis, la laŭleĝa heredanto de la krono estis ja infaneto, tamen reĝino ekzistis, do, reĝo povus iĝi nur tiu, kiu edziĝus kun la reĝino.

Penelopa, en la tuta longa daŭro de la foresto de ŝia edzo, vivis preskaŭ izolite, ŝi komuniĝis kaj interrilatiĝis nur kun elektitaj parencoj, kun tre malmultaj amikinoj kaj fidelaj sekvantinoj kaj servistinoj. Ŝi neniam akceptis virojn kaj ŝi ne respondis al mesaĝoj kaj invitoj.

En la komenco nur kelkaj, pli poste pli multaj, fine preskaŭ ĉiuj junaj filoj de la pli distingitaj familioj de la loko komencis viziti, pli poste sen permeso eniĝi insolente en la reĝan palacon kaj kondukti kvazaŭ ili estus mastroj de la domo. Gardistaro ne estis, la servistoj povis fari nenion, nenia rezisto estis, do, arbitre la invadintoj enlokiĝis en la palaco, ili laŭplaĉe eniris kaj eliris, ili ekspluatadis la proprieton, la bienojn, la tutan posedaĵon de la reĝa familio, per sinsekvaj mesaĝoj ili postulis, ke la reĝino edziniĝu kun iu el ili.

Penelopa, tute senpova, tre malfeliĉa, restis ŝlosita en siaj apartamentoj, ŝi ne respondis al la mesaĝoj, la petoj, la avertoj, la minacoj de la impertinentaj "fianĉoj", ŝi tute ne reagis, ŝi ĉiam esperis al la reveno de sia amata edzo.

Dume, la landon atingis diversaj, rebatataj inter si, novaĵoj; kelkaj diradis ke la milito estis antaŭ longe finita, ke Odiseo estis mortigita, aliaj diradis la kontraŭon, kaj la tempo pasadis turmente.

Estis jam pasintaj preskaŭ dudek jaroj, kiam, la fianĉoj, perdinte la paciencon, anoncis per severa mesaĝo al Penelopa ke ili decidis devigi ŝin, eĉ perforte se necese, tuj elekti inter ili sian novan edzon

kaj reĝon de Itako. Penelopa sciis bone ke estas en danĝero ne nur ŝia vivo, sed ankaŭ la vivo de ŝia filo, kiu, junulo jam, vivis preskaŭ prizonigite en la palaco, li povis mastrumi nenion el sia heredaĵo, li estis sub la sendorma atento kaj kontrolo de la uzurpintoj de lia havaĵo kaj rajtoj.

Nu, sub minaco de morto, Penelopa decidis cedi kaj sin prezentis al la fianĉoj, en la granda salono de la centra palaco. Ekvidinte ŝin, la krudaĉaj viroj surpriziĝis; la tempo tute ne estis tuŝinta la reĝinon, kies la eksterordinara, jam matura, beleco donis al ŝi aspekton de ia ekstermonda, diina majesteco. Ŝi fiere staris antaŭ la mutigitaj fianĉoj kaj ŝi anoncis, ke ŝi estas preta elekti el inter ili edzon, sed, ŝi unue devas plenumi sian lastan sanktan devon al sia unua familio, teksu la mortotukon de sia tre maljuna bopatro. La fianĉoj kun ĝojo akceptis la decidon kaj la kondiĉon de Penelopa, kiu komencis sin okupi pri la teksado de reĝdeca mortotuko. Ili senpacience atendadis, tamen la laboro de Penelopa daŭris kaj daŭris, ne finiĝis, kaj tio okazis, ĉar la matenon ĉiuj vidis, ke la reĝino fervore, senriproze laboris, ŝi teksadis la valoran, belege ornamitan mortotukon, tamen, ĉiun nokton, tute sola, ŝi dismaŝigis, malfaris la tutan laboron de la tago!

Tiele, la tempo pasis kaj neniu povis esprimi malkontentecon kontraŭ la laborema reĝino, kiu, fidela al sia promeso, daŭrigis sian laboron; la fianĉoj devis ŝin atenti kaj atendi.

Telemaĥo, ekspluatinte la novan situacion, la trankviliĝon de la fianĉoj kies la atento estis iom malstreĉita, kaŝe foriris kun nur kelkaj fidindaj kunuloj per boato, celante mem ricevi certajn informojn pri la sorto de sia patro. Li iris al Sparto, ĉe la reĝo Menelao (Μενέλαος), malnova amiko kaj kunbatalanto de Odiseo. La reĝo bonakceptis la junulon kaj priskribis al li detale ĉion pri la heroaĵoj de lia patro dum la kruela, longa milito, pri ĉio ajn rilata al ĝi kaj certigis lin, ke, laŭ fidindaj informoj, Odiseo spertis tre malfacilan ŝipradon, sed li vivas kaj baldaŭ revenos al sia patrujo. Telemaĥo, tre kontenta, same kaŝe revenis al Itako, kie lia foresto estis jam konstatita. Li, do, alboridiĝis al dezerta loko de la insulo kaj piede sin direktis al la porkostalo de Eŭmeo (Εύμαιος), malnova, fidela servisto de la palaco, celante diri al la fianĉoj ke li estis longe tie. Intertempe, la mult-jara vagado de Odiseo atingis sian finon. La hejmenirado de la granda heroo daŭris multajn jarojn kaj ĝi estis plena je neordinare ekstremaj aventuroj, bataloj, suferoj, kies la rakontado postulas centojn da paĝoj. Malmult-vorte mi diru, ke, post ŝip-dronado, la heroo estis elfetita sur dezerta loko de sia insulo. Li estis en tre malbona stato, tute nerekoncible. Vilaĝanoj, kiuj renkontis kaj



kompreneble ne rekonis lin, helpis kaj kondukis lin al la gregejo de la porkobredisto, de tiu sama, fidela servisto, Eŭmeo. Tiele, hazarde Odiseo renkontis sian filon, kaj la renkontiĝo kaj la rekono, ĉio, estis, kompreneble, tute ne simpla kaj facila, estis etoso de ne priskribebla, forta emocio, estis multo, tamen ĉi tie nur tion mi diros.

Estas certe, ke la du viroj faris planon, laŭ kiu, la matenon de la posta tago Odiseo, en formo de grandaĝa, kompatinda almozetanto, sin prezentis en la korto de la palaco, li vagadis ĉie, li observis ĉion, li eniris en la grandan salonon, en kiu la fianĉoj manĝadis, ludadis, amuziĝis brue kaj per siaj propraj okuloj li vidis kia estas la situacio en sia propra domo. Li spertis ankaŭ la severecon kaj senkompatemon de la krudaj, malĝentilaj viroj, kiuj riproĉis, insultis, forpuŝis, eĉ batis lin, kiam li petis de ili almozon.

Penelopa, kiu iun momenton vidis de malproksime iun tian scenon, ordonis sian maljunan servistinon Eŭriklian (Ευρύκλεια) flegi kaj manĝigi la almozulon. La maljunulino, kiu estis la unua vartistino de Odiseo, la tiam juna servistino, kiu la unua lulis kaj ameme prizorgis la reĝidon en lia unua infaneco, kondukis la almozulon al la banejo, por ke li lavu siajn piedojn. Tiam, tute hazarde ŝi rimarkis sur la femuro de la viro neordinaran steloforman cikatron, tute similan al tiu, kiun estis lasinta al la eta Odiseo sufiĉe serioza mordovundo de hundo. La maljuna virino surpriziĝis, ŝi rigardis atente la almozulon kaj en tre forta korbato, kun nereteneblaj larmoj de freneza ĝojo rekonis sian amatan mastron.

Por rakonti detale la tutan aferon oni bezonas multajn paĝojn, do, mi diru nur tion, ke Odiseo sin malkovris nur al sia filo, al la maljuna servistino, al Eŭmeo kaj al unu ankoraŭ malnova, fidela servisto de la palaco nomata Filitio (Φιλοίτιος). Penelopa sciis nur tion kion diris al ŝi ŝia filo, ke ŝi invitu ĉiujn fianĉojn en la grandan salonon de la palaco por anonci al ili ke ŝi estas preta elekti sian novan edzon. Kompreneble, en

la komenco la reĝino maltrankviliĝis, ŝi postulis eksplikojn, tamen Telemaĥo certigis ŝin ke ŝi elektos neniun, ke ŝi nur devas diri tiun mensogon por trompi la fianĉojn.

Do, Penelopa faris tion kion ŝia filo petis de ŝi, kaj kiam ĉiuj senpaciencaj fianĉoj eniris en la salonon, ŝi prezentis al ili la malnovan, grandegan pafarkon de Odiseo, kiu restis ankoraŭ pendigita sur la muro, kiel simbolo de la forto de la forestanta mastro. Ŝi, do, diris al la fianĉoj, ke ŝi akceptos kiel edzon tiun, kiu povos streĉi la arkon kaj pafi per ĝi unu el la pezaj metalaj ĝiaj sagoj.

Intertempe, laŭ la instrukcioj de Odiseo, fidindaj al Eŭriklia servistinoj fermis de ekstere per firmaj herroj ĉiujn pordojn el kiuj oni povis eliri el la palaco.

Penelopo liveris la pafarkon al sia filo kaj, laŭ la plano, foriris kaj sin ŝlosis en sia apartamento. Tiam komenciĝis la konkurso. La unu post la alia la fianĉoj provis streĉi la pafarkon, sed neniu povis fari tion, la grandega armilo postulis forton superhoman, la forton de Odiseo.

Kiam estis pruvite ke la kondiĉo de Penelopa ne estas plenumbla, la fianĉoj donis la pafarkon al Telemaĥo kaj komencis brue protesti kaj disputi inter si pri tio, kion ili devas nun fari. Tiam, la almozulo, per tre laŭta voĉo, petis de Telemaĥo la permeson, provi streĉi la arkon. Kelkaj el la fianĉoj ridaĉis, aliaj kolere insultis la arogantan almozulon kaj kelkaj minace moviĝis kontraŭ lin. Tamen, Telemaĥo donis la pafarkon al sia patro, kiu, forĵetinte la ĉifonan mantelon, elrektiĝis antaŭ la surprizitaj viroj, montrante en ĝia plena brilo la fortan sian korpon kaj la impresan sian staturon. Per certaj movoj kaj kun nekredbla facileco li streĉis la pezan pafarkon. La unua lia sago trapikis la gorĝon de Antinoo (Αντίνοος), la plej forta kaj plej impertinenta el ĉiuj uz-urpintoj!

Sekvis tumulto, sekvis senindulga masakro; Odiseo, furioza, helpate de Telemaĥo kaj la du fidelaj servistoj, per sagoj, per lanĉo, per glavo, per siaj pugnoj, mortigis la unun post la alia ĉiujn insolentajn ofendintojn de sia edzino kaj gento. Post mallonga batalo, cent ok senvivaj korpoj kuŝis sur la planko de la palacaj salonoj. Ĉio estis finita!

Sekvis la reunuiĝo de la feliĉaj geedzoj, kiu ne estas priskribebla. Mi povas diri multon, sed estas tute certe, ke ĉiu el ni, laŭ sia fantazio kaj sentemo, povas facile formi en la menso la feliĉan daŭrigojn de la historio, oni ja povas starigi scenojn certe kortuŝajn. Al mi restas emfazi ankoraŭfoje tion, ke la nomo de Penelopa restas en la eterneco kiel sinonimo de la fideleco, de la edzina fideleco. Restas ĉiam viva la sinteno de la kuraĝa virino, kiu, fidela al sia unika amo, dum dudek plenaj jaroj riskis ĉiutage sian

reputacion, sian honoron, sian liberecon, sian vivon mem, por ne perdi sian koron. Kaj estas ĉie en la mondo konata la lerta artifiko de Penelopa pri la matena teksado kaj la nokta maltrikado de la mortotuko.

Estas kompreneble, ke la historio de Penelopa inspiris multajn ĉiaartajn grandajn kreintojn de ĉiuj

epokoj, kiuj postlasis abundon da belegaj artaĵoj, de freskoj, skulptaĵoj, pentraĵoj k.a., ĝis opero!

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO (elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

Konkurso Hristo Gorov

REZULTOJ DE LA INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO "HRISTO GOROV"

En 2020 Bulgara Esperanto-Asocio sepan fojon organizis la Internacian Esperantan Literaturan Konkurson "Hristo Gorov - Hrima". La konkurso estas tradicia kaj en ĝi partoprenas Esperantaj aŭtoroj el diversaj landoj.

Ĉijare en la literatura konkurso partoprenis Esperantaj verkistoj el **Brazilo, Francio, Irano, Kongo, Rusio, Litovio, Ĉeĥio, Turkio, Germanio, Rumanio, Italio, Britio, Tanzanio, Tajvano, Armenio, Pollando, Slovakio, Ukrainio, Nov Zelando, Bulgario**. Ili sendis 17 rakontojn kaj 8 eseojn.

Organizanto de la konkurso estas Maja Gorova, vicprezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio, filino de Hristo Gorov.

Anoj de la ĵurio estas: Georgi Mihalkov – Bulgario, Laure Patas d'Illyers – Francio kaj Venelin Mitev – Bulgario

Premioj por originala rakonto en Esperanto:

Unua premio: Ke vi povu vivi en interesaj tempoj - Massimo Acciai Baggiani - Italio

Dua premio: Opera kantisto - Georgi Marinov Mihajlov- Bulgario

Tria premio: Ni ne frotu la vitron! - William Graig - Nov-Zelando

Premioj por originala eseo en Esperanto:

Unua premio: Ĉu la interna ideo de Esperanto ŝanĝiĝas dum la 21 a jarcento - Paulo S. Viana – Brazilo

Dua premio: En defendo de la naturo - Stanislaw Polanowski - Pollando

Tria premio: Esperanto kaj Naturo - Tatjana Auderskaja

La gajnintoj ricevas valorajn premiojn.

La Internacia Esperanta Literatura Konkurso "Hristo Gorov - Hrima" elokvente montras, ke la originala Esperanto-literaturo estas tre grava por la Internacia Lingvo. La geesperantistoj el la tuta mondo ne nur ŝatas la literaturon, sed multaj el ili kreas valorajn Esperantajn verkojn.

Georgi Mihalkov – prezidanto de la ĵurio

Krucvortenigmo



SILABA KRUCVORTENIGMO

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonataj silaboj:

AB, BO, BO, DO, GO, KOM, LA, LE, LU, MA, MA, MEN, MEN, NE, NO, NOR, PA, PLI, RO, SI, SO, STA, TA, TE, TO, TO.

| | | | | | | |
|----|---|---|---|----|---|---|
| 1 | 2 | | 3 | 4 | | 5 |
| 6 | | | 7 | | | |
| | | 8 | | | 9 | |
| 10 | | | | 11 | | |

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Okaza ___ ne iras al testamento (Zamenhof); 2. Iri de unu loko al alia; 3. Nenorma; 4. Natria hidroksido; 5. Okaza komplimento ne iras al ___; 7. Hispana danco; 8. Prezertanta kontraŭecon; 9. 24 horoj.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Kamarado; 3. Vere, nepre; 6. Krispigi; 7. Bona aranĝo; 8. Antipatia, malinklina; 9. Malgraŭ tio; 10. Volumeno de la ŝipinterno; 11. Ĉefurbo de Kolombio.

Fonto: **Semajno de Enigmoj #6**

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Miyamoto Masao

Idealisto kun meditema klarvido



Miyamoto Masao (1913-1989) estas sendube la plej konata japana Esperanto-verkisto kaj poeto. Fakte ne svarmas Esperanto-poetoj en Japanio, en Esperanta Antologio, poemoj 1887-1981, nur 8 poetoj el Japanio aperas en la tuto de 163 poetoj. Sed Japanio povas des pli fieri pri siaj esperantistaj erudiciuloj, kiuj dediĉis jardekojn al fundamentaj esploroj kaj eldontaskoj serve al la lingvo kaj ĝia kreinto, d-ro Zamenhof. Du nomoj estas ĉi tie aparte menciindaj: Itô Kanzi kaj Rihej Nomura. Itô Kanzi, kiu famiĝis sub la pseŭdonimo Ludovikito, plenumis la gigantan taskon kolekti, aranĝi, komenti kaj eldoni la tutan verkaron de Zamenhof, originalan kaj tradukitan. Rihej Nomura kompilis la valoregan libron Zamenhofa Ekzemplaro, kiu entenas esprimojn ligitajn al ĉiuj vortoj, kiujn Zamenhof uzis en frazoj. Tiuj du sindonemaj homoj faris nesupertakseblajn servojn al la Esperanto-kulturo.

Miyamoto Masao naskiĝis en vilaĝo borde de rivero, aŭ tiel oni povas diveni el lia poemo *Ĉe flu' hejmloka*. Li vizitis sian hejmlokon multajn jarojn poste kaj trovis ĉion draste ŝanĝiĝinta; la rivero suferis, eĉ la surborda roko, de kie li knabaĝa plonĝis en la riverfluan, malaperis:

*Jam ne profundas
l'amika flu' hejmloka!
Ho, kie iam
mi preskaŭ dronis? Kie
nun la plonĝejo roka?*

La formo de la poemo estas la japana utao, 5 linioj kiuj konsistas el 5, 7, 5, 7, 7 silaboj. Tiu fomo kaj la parenca hajko (3 linioj kun 5, 7, 5 silaboj) estas

multe ŝatataj de la japanaj Esperanto-poetoj. La poemplibro de Miyamoto havas la titolon *Invit' al japanesko* (1971), "japanesko" signifanta "poemo subtil-nuanca laŭ japana tradicia stilo".

Miyamoto Masao havis karakteron de aktiva idealisto. Dum du jardekoj ekde siaj fruaj jaroj li aktive laboris politike. Li estis membro de la japana komunista partio kaj multe laboris pri organizado de laboristaj sindikatoj. Li estis kelkfoje arestita kaj estis en karcero dum du jaroj. En 1944 li servis kiel soldato en Okinavo kaj partoprenis la batalon sur tiu insulo kontraŭ la usona armeo. Pri tiu terura sperto li verkis eksterordinaran libron, *Naskitaj sur la ruino – Okinavo* (1976). En postparolo li priskribis, kiom malfacile estis por li rakonti pri tiu batalo: "Mi komencis tajpi, sed tuj forlasis, komencis kaj forlasis ... dum tiu tempo mi baraktis ne pro la malemo nek pro malvervo, sed io longe malhelpis min verki."

Miyamoto eklernis Esperanton en 1933, tiam en karcero. Ekde 1950, ekŝiĝinte el ĉia politika agado, li laboris ekskluzive por Esperanto. Li fariĝis sekretario de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG). En aprilo 1981 mi estis bonŝanca renkonti lin en la oficejo de la Ligo en Kyoto. Nia interparolo, sonbende registrita, estas por mi bela memoraĵo pri tiu eksterordinara homo. Ni ne parolis pri lia vivo, sed pri liaj libroj kaj kion ili respegulas. Miyamoto estis homo de meditema klarvido kaj subtile sentema pri lirika poezio kaj ĉiaj nuancoj de animaj zorgoj kaj konfliktoj. Ĉi tion li plej bone montras en sia libro *Pri arto kaj morto* (1967). Tie lia fantazio psikologie rekreas cirkonstancojn de ekstretoj en la vivo de japanaj poem-majstroj de antaŭaj tempoj – Okura, Rikyu, Basho, kaj pliaj. Tiu libro de Miyamoto bele atestas lian psikologian penetremon kaj lian profundan sentemon pri detaloj, kiuj solaj povas rekrei fidindan atmosferon.

Miyamoto estis diligenta tradukanto de japana literaturo en Esperanton. Tie elstaras liaj tradukoj el la tradicia japana poezio pri kiu li estis specialisto. Aparte interesa pri tio, kiel traduki la japanajn versoformojn hajko kaj utao en Esperanton, estas la korespondado inter li kaj Ueyama Masao, alia specialisto pri la temo. Tiuj leteroj aperis en la esearo de Miyamoto *Sarkasme kaj entuziasme* (1979).

En 1983 aperis la granda *Vortaro Japana-Esperanta*, kompilita de Miyamoto Masao. Presita sur fajna, maldika papero kun malgranda literaro ĝi ampleksas 1083 paĝojn. Eble oni rajtas konsideri ĝin la ĉefverko de Miyamoto. Per ĝi li okupas lokon sur la sama honora benko kiel la erudiciuloj menciitaj

komence en tiu ĉi artikoleto, Itô Kanzi kaj Rihej Nomura. Kaj lian literaturan agadon oni povas rigardi kiel abunde floran girlandon ornamantan lian lokon de honoro.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro113, 2005)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/miyamoto.html>

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo DUA PARTO - LA VIVO

76



**La homo, kiu komencas vivi,
estas mola kaj malforta,
kaj kiam homo mortas,
tiu homo estas dura kaj forta.
La plantoj, kiuj komencas vivi,
estas molaj kaj delikataj,
kaj kiam ili mortas, magraj kaj rigidaj.
Tial la malmoluloj kaj fortuloj
estas kunuloj de l' morto,
kaj la moluloj kaj malfortuloj
kunuloj de l' vivo.**

El tio sekvas:

**Se la armiloj estas fortaj, ili ne venkas.
Se la arboj estas fortaj, oni dehakas ilin.
La granda kaj forta estas sube.
La mola kaj malforta supre.**

Rimarkoj de Anniespera:

Laŭ mi, Se la arboj estas fortaj, ili estos dehakitaj ne nur de homoj, sed ankaŭ rompiĝos de forta vento ks., ĉu ne? Vd. de Wang Chongfang:
„Kaj la arbo, kreskinte forta, rompiĝos.“

Rimarkoj de Cezar


Denove montriĝas, ke Laocio estis dialektiva filozofa, ankaŭ la leĝo pri la subita transformiĝo de amasigita kvanto en novan kvaliton nerekte estas jam priskribita en la ĉapitro. Fortaj armiloj estas por Laocio, tute laŭ ties pacifisma sinteno, malbonaŭguroj: Krome, leganto, pripensu mem: kiu estas pli forta, pli eltenema, la kamparano aŭ la militisto? Sen kamparanoj la militistoj devus malsatmorti. Sed la senarmilaj kamparanoj povus vivi sen la militistoj, kiuj nur povas detrui, ne krei ion, ne nutri sin. Do, pli vivkapabla estas la senarmila kamparano, ĉar oni bezonas lin ĉiam, la militiston oni bezonas nur por detrui ion, por regi perforte.

(daŭrigota)

La motorciklo

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Britio

Bone, estis noktomezo. Tage, ni havas virkokojn, kiuj frumatene vekas nin, sed nokte, estas la vico de lupoj, kiuj ululante vekas la mortintojn. Kaj fakte tiunoktmeze granda blanka lupo alproksimiĝis al la vilaĝeta tombejo kaj per longa blekado ĝi igis la forpasintojn eliri el siaj tomboj.



Okazis do, ke du fantomoj, enterigitaj en du apudaj tomboj, renkontiĝis tie sur la pado flor-ornamita kaj komencis interparoli:

- Saluton kara! ĉu ankaŭ vi mortis hieraŭ?

- Bonan nokton al vi! jes, bedaŭrinde! Mi estis konata bankejestro, nenio mankis al mi, mi vivis feliĉe, sed mi havis koratakon kaj jen mi, ĉi tie! kaj vi?"

- Ho, ankaŭ mi vivis feliĉe, mi estis sportulo, pli precize, mi estis fama motorciklisto, mi gajnis multajn premiojn en sportkonkursoj internaciaj, sed mi malsaniĝis pro diabeto kaj... amen!"

Tiel babilante pri tio kaj tio ĉi, la du virfantomoj alvenis al la enirejo de la tombejo, kie, ekstere, estis belega nova motorciklo, eble de la tombejogardisto.

- Rigardu! - ekkriis la sportulo al la bankejestro - kia admirinda motorciklo! ho kiom multe mi ŝatus rajdi ĝin nur ankoraŭ unufoje! ĉu vi volas veni kun mi? ni

iru! ni kur-veturu per ĝi tra la stratoj urbaj!! ni tre amuziĝos!

- Jes, kial ne?- respondis la bankejestro - mi neniam iris sur motorciklo, kaj tio certe devas esti sperto spertinda! nur atendu min dum kelkaj momentoj!

Kaj dirinte tion, li forkuris returne al la vojo de kie ili devenis. Post mallonga tempo, li reaperis, kun du tomboŝtonoj sub siaj brakoj.

- Kion vi faras? demandis la sportulo.

- Mi prenis niajn identigilojn, okaze, ke la strat-policistoj haltigos nin!



(tradukaĵo)

Erik Tantal

La Kimero

Rakonto el la estonteco

1-a Eldono 2020



La tuta simia familio forlasis la malantaŭajn areojn kaj traserĉis ĉiun milimetron de la grundo apud la vitraj fenestroj. La bestozorgistoj ĵus ĵetis vinberojn teren. Tia delikataĵo ne aperas ĉiutage.

„Ha, ĉi tien vi fuĝis. Nun mi scias. Vi certe ŝanĝos vian studfakon“. Irene ankaŭ ne iris al la sporthalo. Kial Volker volis iri al la sekcio de la primatoj? Scivoleme ŝi sekvis lin.

„Jes, eventuale etologio, tio estus bona, ĉu ne? Vidu, kiel intense la ĉimpanzoj serĉas! Maldekstre la du estas la gepatroj, oni uzas ilin por la bredado. La malgranda je la dekstra flanko estas 'Mojo'. Iam li estos organdonacanto. Oni prenos lian koron por transplantado“, respondis Volker kun mallaŭta voĉo.

„Kaj la aliaj?“, demandis Irene. Volker jam antaŭe bone informiĝis.

„Tiuj du iam estos liberigataj en la naturon. Ili verŝajne estas la plej bonŝancaj“.

Intertempe frandaĵoj ne plu estis troveblaj. La ĉimpanzoj iom post iom malaperis irante al la malantaŭaj areoj. Nur Mojo restis. Li kaŭris en la mezo antaŭ la fenestro kaj tamburis per sia dekstra mano al la vitraĵo.

Volker proksimiĝis al li vokante: „Mo-jo, Mo-jo“.

Imitante la lipajn movojn de Volker Mojo frapis sian bruston per la dekstra mano. Poste li tuŝis la vitraĵon kaj fingromontris al Volker. Dum tio li okulfrape movis siajn lipojn. Oni ne aŭdis ion, sed ŝajne li provis elparoli la vorton 'Vol-ker'. Nun ankaŭ Irene proksimiĝis al la vitraĵo. Ŝi rekte rigardis al li en la vizaĵon. Mojo tuj reagis. Per montrofingro li frapis la vitraĵon kaj fiksas la okulojn ekzakte al Irene. Li plurfoje kapoklinis plifortigante la frapadon.

Irene nun komprenis, ke li volis aŭdi ŝian nomon. Ŝi mem frapis sian bruston per la mano kaj diris: „Jes, mi estas I-re-ne, I-re-ne“.

Tuj la ĉimpanzo imitis ŝiajn lipajn movojn. Li saltis

Ludo

Tuj post la seminario Volker direktiĝis al la instituto kaj eksidis sur benko antaŭ la baraĵo por la ĉimpanzoj. Hodiaŭ ĉi tie regis multe da vigleco. Kontraŭe al la situacio je la pasinta fojo ĉiuj kvin ĉimpanzoj ekvidiĝis.

malantaŭen kaj gaje hopis. Tiu gajeco kompreneble ankaŭ kaptis la du kunstudentojn.

„Jes, tio estas vere amuza. Mi tute ne povas imagi tion. Tia ĉarma estaĵo estos kanibaligita!“ Irene komentis.

Volker kapjesis kaj daŭrigis la provojn kontakti Mojo. Per la pugno li frapis la vitraĵon. Mojo tute neatendite reagis. Li ne imitis la pugnon. Li montris la malfermitan manon. Volker ne komprenis tion ne sciante kion fari. Sed Mojo ne rezignis. Li nun alterne per sia dekstra mano montris pugnon aŭ manplaton. Irene ankaŭ partoprenis la senvortan komunikadon kaj imitis fermon kaj malfermon de la mano. Dum tio senkonscie ŝi disetendis la fingrojn.

Mojo malantaŭen saltis kaj ekscite ridis. Li vaste malfermis sian buŝon, montrante la dentojn kaj puŝe spiris. Li alterne batis sian bruston per dekstra pugno aŭ manplato. Li faris tion ankaŭ per la maldekstra mano, sed je tiu mano li disetendis la fingrojn. La tutan sinsekvon de la movoj li plurfoje ripetis.

„Ĉu li volas doni al ni tri signalojn?“, demandis Volker kaj nun ankaŭ ripete montris tiujn movojn per la sama ritmo, kiel pugo, manplato kaj manplato kun disetenditaj fingroj.

„Mi komprenas!“ ekkris Irene: „Ŝtono- papero- tondilo! Li volas ludi kun ni! Ching- Chang- Chung! Tion vi ankaŭ konas, Volker!“

Nekredeble. Tio estis la solvo. La eta ĉimpanzo volis ludi kun ili. Verŝajne li lernis tiun ludon de aliaj vizitantoj, certe infanoj. Pro la tipa formo de lia mano li kompreneble ne kapablis montri la signon 'tondilo' per nur du fingroj. Anstataŭe li ofertis simple la manplaton kun etenditaj fingroj. Por komenci la ludon li uzis eĉ akustikajn komandojn. Tiuj estis malfacile kompreneblaj. Tamen, anstataŭ 'Ching- Chang- Chung' venis io kiel 'Kik- Kak- Kuk', do kliksonantaj signaloj. Kaj Irene ne atendis, ke ŝi devis vere koncentriĝi por ne perdi kontraŭ Mojo. Ĉiufoje, kiam li venkis, li gaje saltis malantaŭen kaj tie hopis ridante.

Volker per sia smartfono [*] ekfilmis kelkajn sekvencojn de tiu ludo. Sed tuj, kiam Mojo rimarkis tion, li interrompis la ludon. La tutan vizaĵon li nun premis kontraŭ la vitraĵon kaj frapis ĝin per ambaŭ manoj. Kion signifis tio? Li reagis eĉ pli ekscitita, kiam nun ankaŭ Irene eligis ŝian smartfonon. Mojo direktis sian dekstran manon nun alterne al la du aparatoj. Dum tio li malkviete levis kaj mallevis sian superan korpon. Ĉu tiu estis signalo, per kiu li provis malhelpi filmadon kaj fotadon?



KVARTETO

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Petola best' Simio,
Saĝul' Azen',
La Kapro kun solen-mien'
Kaj Urso sen gracio —
Decidis pri kvarteta lud'.
Jen estas notoj, instrument' muzika
Kaj en herbejo — lok' unika —
Plenravos ili mondon, sen diskut',
Ekfrotis arĉa ar', sed veas la rezult'.
"He, haltu vi!" Simio krias: — Ne rapidu!
Por belo de muzik' laŭ ordo vi eksidu.
Amiko baso Urs', vi sidu kontraŭ ald',
Kun violon' kontraŭos mi en paro,
Jen tiam en muzik' aperos la ekzalt':
Dancigos ni betulojn en arbaro."
Eksidis ili laŭ propon',
Sed en la muzik' — la sama ton'.
"Atentu! Estas jen rezon' ",
Azeno krias: "Por muzik' efekta
Ni sidu en linio rekta".

Eksidis ili laŭ azen-supoz',
Sed en Kvartet' rezultas nur ĥaos'.
Do pligrandiĝis nun la forto de diskutoj
Kun la disputoj
Pri ordo kaj pri lok'.
Hazarde Najtingal' alflugis sen alvok',
Kaj oni petas ĝin pri helpo en la kazo.
"Sufiĉas unu hor' por estu certa bazo
Al la Kvartet'. Ni petas pri konsil',
Jen notojn havas ni, jen estas muzikil',
Nur diru pri sidloka stil".
"Por esti muzikist' ", ĝi diris kun emfazo:
"Necesas lerni pri la bel'
Kaj senton havi en orel'.
Do sendepende de sidloko
Muziko via estas moko".

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Venelin Mitev - poeto ambasadoro

verkis kaj sendis Elena Popova el Bugario

VENELIN MITEV estas ĵurnalisto, poeto, verkisto, tradukisto, literatura kritikisto, libroredaktoro, fama esperantisto. Li estas Honora membro de Bulgara Esperanto-Unio / BEA / kaj la Esperanta PEN-Centro.



Li diplomiĝis en bulgara kaj franca filologio ĉe Universitato "St Kliment Ohridski" en Sofio. Longaj jaroj li laboris kiel korespondanto de Bulgara Informa agentejo/ BTA / en

Moskvo kaj Parizo. Li estis ĉefredaktoro de revuoj "Bulgara esperantisto" kaj "Panorama Esperanto"/ bulgarlingva/. Li estis direktoro de Eldonejo "Pres-Esperanto".

Li estas aŭtoro de la libroj "Somero cigana" - poemaro, redaktita de mondfama poeto Willam Auld, "Vaganto inter la steloj", 2016 - poezio. Trege grava estas por la eperantistoj lia libro "Tradukarto", 1991. Li kompilis Antologion en Esperanto de bulgara ama liriko. Li tradukis el la bulgara poemojn de naciaj klasikuloj kaj nuntempaj aŭtoroj kaj tradukis ankaŭ el Esperanto versojn de William Auld, Giorgio Silfer,

Tibor Sekeli, Eli Urbanova, Hilda Dresen, Nadija Andrianova kaj aliaj Esperanto-poetoj.

Li helpas, kiel redaktoro al multaj bulgaraj aŭtoroj, ankaŭ al mi. Li eldonis miajn unuajn tri librojn en bulgara kaj estis redaktoro al kelke da miaj libroj en Esperanto. Mi kore dankas al li pri lia koro, plena kun boneco.

Mi ĝuas al la poemoj en lia libro VAGANTO INTER LA STELOJ, kie oni povus legi:

* *La libero signifas esti si mem.*

* *Vivi signifas riski... Nur kiu riskas, tiu rajtas esti libera!*

* *La fino de l'vojo estas sama por ĉiuj.*

* *La plej terura silento ekestas, kiam ĉesas paroli poetoj.*

* *Ne bedaŭru pri la perdoj!*

En tiu poemo li verkas ankaŭ: La homo estas tio, kio restas,/ post kiam li perdas ĉion.

Post Venelin Mitev restas grandan riĉecon - liajn librojn. Kaj la memoro pri lia boneco.

Iam L.Trifonĉovski skribis por li: "Se oni min demandas kiu estas la bulgara ambasadoro pri la legantoj-esperantistoj, mia respondo estas, ke tio estas vi..."

Mi deziras bonan vojon al la poeto - ambasadoro! Multe da jaroj li vagu inter la steloj!



Franco KAFKO (Franz Kafka)
Interparolo kun la preĝisto



Ekzistis tempo, en kiu mi iris tagon post tago en preĝejon, ĉar knabino, al kiu mi enamiĝis, preĝis tie genuante duonan horon vespere, dum mi povis ŝin trankvile rigardi. Kiam foje la knabino ne estis veninta kaj mi rigardis maleme al la preĝantoj, okulfrapis min homo, kiu estis sin teren ĵetinta

kun sia tuta magra korpo. De tempo al tempo li kaptis per la tuta forto de sia korpo sian kranion kaj frapegis ĝin suspire en siajn manplatojn kuŝantajn sur la ŝtonoj.

En la preĝejo estis nur kelkaj maljunulinoj, kiuj ofte turnis sian tukvolvitajn kapeton kun flanko klino, por rigardi al la preĝanto. Tiu atento ŝajnis lin feliĉigi, ĉar antaŭ ĉiu sia pia erupcio li ĉirkaŭirigis siajn okulojn, ĉu la spektantaj homoj estas multnombraj. Mi trovis tion maldeca kaj decidis lin alparoli, kiam li eliros el la preĝejo, kaj lin pridemandi, kial li preĝas en tiu maniero.

Sed nur post horo li leviĝis, faris tute precizan krucosignon kaj iris intermite al la pelvo. Mi postenigis min survoje inter pelvo kaj pordo kaj sciis, ke mi ne tralazos lin sen klarigo. Mi deformis mian buŝon, kiel mi ĉiam faras prepare, kiam mi volas paroli decide. Mi antaŭpaŝis kun la dekstra gambo kaj apogis min sur ĝin, dum mi tenis la maldekstran neglekte sur la piedpinto; ankaŭ tio donas al mi firmecon.

Povas esti, ke tiu homo jam alstrabis min, ŝprucante la sanktan akvon en sian vizaĝon, sed ankaŭ eblas, ke li jam antaŭe rimarkis min kun timo, ĉar nun li neatendite elkuris tra la pordo. La vitra pordo batfermiĝis. Kaj kiam mi tuj poste paŝis el la pordo, mi ne plu vidis lin, ĉar tie estis kelkaj mallarĝaj stratetoj kaj la trafiko multis.

La sekvajn tagojn li forestis, sed venis mia knabino. Ŝi estis en la nigra robo, kiu havis sur la ŝultroj travideblajn puntaĵojn, - la duonlumo de la ĉemizrando kuŝis sub ili -, de kies malsupra rando la silko finiĝis en belforma kolumo. Kaj ĉar la knabino venis, mi forgesis la junulon kaj okupiĝis pri li eĉ ne tiam, kiam li poste ree venis regule kaj preĝis laŭ sia kutimo. Sed ĉiam li preterpasis min tre urĝe, kun forturnita vizaĝo. Eble pro tio, ke mi povis imagi lin nur en movo, tiel ke ŝajnis al mi, eĉ kiam li staris, kvazaŭ li

ŝtelirus.

Foje mi malfruis en mia ĉambro. Tamen mi iris ankoraŭ en la preĝejon. Mi ne plu trovis la knabinon tie kaj volis hejmeniĝi. Jen rekuŝis tie tiu junulo. La iama okazintaĵo ekpensigis min nun kaj igis min sciema.

Piedpinte mi glitis al la pordejo, donis moneron al la blinda almuzulo tie sidanta kaj premis min apud li post la malferman pordoklapon; tie mi sidis horon kaj faris eble ruzan vizaĝon. Mi sentis min bone tie kaj decidis ofte reveni. En la dua horo mi trovis sensenca sidi ĉi tie pro la preĝisto. Kaj tamen mi lasis eĉ trian horon, jam kolere, la araneojn rampi sur miajn vestaĵojn, dum la lastaj homoj laŭtspire paŝis el la preĝeja mallumo. Tiam venis ankaŭ li. Li iris singarde kaj liaj piedoj unue supraĵe pripalpis la plankon, antaŭ ol trovi.

Mi leviĝis, faris grandan kaj rektan paŝon kaj ekprenis la junulon. "Bonan vesperon", mi diris kaj, kun mia mano ĉe lia kolumo, mi puŝis lin sur la ŝtuparoj malsupren al la prilumata placo.

Kiam mi estis malsupre, li diris kun voĉo tute senfirma: "Bonan vesperon, kara, kara sinjoro, ne koleru min, vian plej sindonan servanton."

"Jes", diris mi, "mi volas ion al vi demandi, sinjoro; lastan fojon vi eskapis al mi, tion vi hodiaŭ apenaŭ sukcesos."

"Vi estas kompatema, sinjoro, kaj vi lasos min iri hejmen. Mi estas kompatinda, jen la vero."

"Ne", mi kriis en la bruon de preteranta tramo, "mi ne lasos vin. Ĝuste tiaj historioj plaĉas al mi. Vi estas mia feliĉa kaptajo. Mi gratulas min."

Tiam li diris: "Aĥ dio, vi havas viglan koron kaj kapon el bloko. Vi nomas min via feliĉa kaptajo; kiom feliĉa vi devas esti! Ĉar mia malfeliĉo estas ŝanceliĝanta malfeliĉo, sur eta pinto ŝanceliĝanta malfeliĉo, kaj se oni ĝin tuŝas, ĝi falas sur la demandinton. Bonan nokton, sinjoro."

"Bone", diris mi kaj tenis lian dekstran manon, "se vi ne respondos al mi, mi komencos voki ĉi tie surstrate. Kaj ĉiuj vendistinoj nun venantaj el la butikoj kaj ĉiuj iliaj amantoj, kiuj antaŭĝojas ilin, kunkuros kredante, ke droŝkoĉevalo falis aŭ ke io simila okazis. Tiam mi montros vin al la uloj."

Tiam li plorante kisis miajn ambaŭ manojn. "Mi diros al vi, kion vi volas scii, sed mi petas, ni prefere iru en la flankstraton tie." Mi kapjesis kaj ni iris tien. Sed li ne kontentiĝis je la mallumo de la strateto, en kiu estis nur tre spacite flavaj lanternoj, sed li kondukis



min en la malaltan vestiblon de malnova domo sub lampeton, kiu gutante pendis antaŭ la ligna ŝtuparo.

Tie li grave prenis sian poŝtukon kaj diris, ĝin sternante sur ŝtupo: "Bonvolu sidiĝi, kara sinjoro, tiel vi povos pli bone demandi, mi restas stara, tiel mi povos pli bone respondi. Sed ne turmentu min."

Tiam mi sidiĝis kaj diris rigardante al li supren kun mallarĝaj okuloj: "Vi estas bela frenezulo, jen vi! Kiel vi do kondutas en preĝejo! Kiom aĉas tio kaj kiom malagrablas por la spektantoj! Kian trudon oni sentas, devante rigardi vin."

Li premis sian korpon kontraŭ la muro, nur la kapon li movis libere en la aero. "Ne koleru - kial vi koleru pri aferoj ne apartenantaj al vi. Mi koleras, kiam mi kondutas mallerte; sed se nur iu alia malbone kondutas, mi ĝojas. Do ne koleru, se mi diras ke estas la celo de mia vivo esti rigardata de la homoj."

"Kion vi diras", mi kriis multe tro laŭte por la malalta pasejo, sed mi poste timis malfortigi la voĉon, "vere, kion vi jen diras. Ja mi jam suspektas, mi tion jam suspektis, de kiam mi vidis vin la unuan fojon, en kiu stato vi estas. Mi havas sperton, kaj ne intencas ŝerci dirante, ke tio estas marmalsano sur firma grundo. Ties esenco estas tia, ke vi forgesis la veran nomon de la aĵoj kaj pro tio nun pro urĝo ŝutas super ilin ajnaj nomojn. Rapide, rapide! Sed vi estas apenaŭ kurinta for de ili, jam denove vi forgesis iliajn nomojn. La poplo en la kampo, al kiu vi donis la nomon "Babela Turo", ĉar vi ne sciis aŭ ne volis scii, ke estas poplo, jam ree blanciĝas sennome kaj vi devas ĝin nomi "Noah, kiam li estis ebria".

Mi estis iom konsternita, kiam li diris: "Mi feliĉas, ke mi ne komprenis tion, kion vi diris." Ekscitita mi rapide diris: "Per tio, ke vi estas feliĉa pro tio, vi montras, ke vi komprenis ĝin."

"Kompreneble mi montris tion, kompatema sinjoro, sed ankaŭ vi parolis strange." Mi metis la manojn sur supera ŝtupo, apogis min malantaŭen kaj demandis en tiu preskaŭ neatablebla teniĝo, kiu estas la lasta savo de la luktantoj: "Vi havas belan manieron vin savi, supozante vian staton ĉe la aliaj."

Je tio li kuraĝiĝis. Li metis la manojn unu en la alian, por doni al sia korpo unuecon, kaj diris kun iometo malemo: "Ne, mi faras tion ne kun ĉiuj, ekzemple ankaŭ ne kun vi, ĉar mi ne povas. Sed mi estus feliĉa, se mi tion povus, ĉar tiam mi ne pluj bezonus la atenton de la homoj en la preĝejo. Ĉu vi scias, kial mi bezonas ĝin?"

Tiu demando mallertigis min. Certe, mi ne sciis ĝin kaj mi kredas, ke mi ankaŭ ne volis scii ĝin. Mi ja ankaŭ ne volis veni ĉi tien, mi tiam diris al mi, sed la ulo devigis min aŭskulti lin. Tiel mi bezonis ja nur kapnei por montri, ke mi ne sciis ĝin, sed mi tute ne

povis movi la kapon.

La homo, starante kontraŭ mi, ridetis. Poste li ekkaŭris sur la genuojn kaj rakontis kun dormema grimaco: "Neniam ekzistis tempo, dum kiu mi per mi mem konvinkiĝis pri mia vivo. Ĉar mi kaptas la aferojn ĉirkaŭ mi nur en tiom efemeraj imagoj, ke mi kredas ĉiam, ke la aferoj iam vivis, sed ke ili estas nun forsinkantaj. Ĉiam, kara sinjoro, mi avidas vidi la aferojn tiaj, kiaj ili emas doni sin, antaŭ ol ili montriĝas al mi. Ili tie estas certe belaj kaj trankvilaj. Tiel devas esti, ĉar mi ofte aŭdas homojn paroli pri ili tiumaniere."

Ĉar mi silentis kaj montris nur per senintencaj tiko, kiom malagrabla mi fartis, li demandis: "Ĉu vi ne kredas, ke la homoj tiel parolas?" Mi kredis devi kapjesi, sed ne povis tion.

"Ĉu vere vi ne kredas tion? Aĥ aŭdu nur; kiam mi kiel infano post mallonga siesto malfermis la okulojn, mi aŭdis, anoraŭ tute dorma, mian patrinon demandi desupre de la balkono en natura tono: 'Kion vi faras tie, karulino, estas tiom varme.' Virino respondis el la ĝardeno: 'Mi manĝetas en la ĝardeno'. Ili diris tion senpripense, kaj ne tro klare, kvazaŭ ĉiu devus atendi tion."

Mi kredis esti demandita, pro tio mi metis mian manon en la postan pantalonpoŝon kaj faris, kvazaŭ mi tie serĉus ion. Sed mi serĉis nenion, mi volis nur ŝanĝi mian aspekton por montri mian partoprenon en la interparolado. Ĉe tio mi diris, ke tiu okazo estas tiel stranga kaj ke mi neniel komprenas ĝin. Mi aldonis ankaŭ, ke mi ne kredas ĝian veron kaj ke ĝi estas certe inventita por celo, kiun mi en la momento ne vidas. Poste mi fermis la okulojn, ĉar ili doloris. "Ha, estas bone, ke vi samopinias kun mi, kaj estis malegoiste ke vi haltigis min por tion diri al mi. Ĉu ne, kial mi hontu - aŭ kial ni hontu - ke mi ne iras rekte kaj peze, ne batas per bastono sur la pavimo kaj ne pretertuŝas la vestaĵojn de la homoj, kiuj laŭte perterpasas. Ĉu mi ne pli ĝuste plenrajte kaj spite plendu, ke mi kiel ombro kun akutaj ŝultroj saltas laŭlonge de la domoj, kelkfoje malaperanta en la vitroj de la montrofenestroj.

Kiajn tagojn mi pasigas! Kial ĉio estas tiom malbone konstruita, ke kelkfoje disfalas altaj domoj, sen ke oni povus trovi eksteran kialon. Mi tiam grimpas super la ruinaĵoj kaj demandas al ĉiu, kiun mi renkontas: "Kiel tio povis do okazi! En nia urbo - nova domo - ĝi estas hodiaŭ jam la kvina - imagu nur." Jen neniu povas respondi al mi.

Ofte homoj falas surstrate kaj restas tie mortaj. Jen ĉiuj komercantoj malfermas siajn pordojn ŝarĝitajn per varoj, lerte alvenas, forigas la mortinton en domon, poste elvenas, kun rideto ĉe buŝo kaj okuloj, kaj parolas: 'Bonan tagon - la ĉielo estas pala - mi vendas

multajn kaptukojn - ja, la milito.' Mi saltas en la domon kaj, post plurfoje kun timo levi la manon kun la kurbita fingro, mi fine frapas ĉe la fenestreto de la pordisto. 'Kara sinjoro', mi diras afable, 'morta homo estas portita al vi. Montru lin al mi, mi petas vin.' Kaj kiam li skuas la kapon, kvazaŭ li estus sendecida, mi diras decide: 'Kara sinjoro. Mi estas sekreta policisto. Montru al mi la mortinton tuj.' 'Mortinton?' li demandas nun kaj estas preskaŭ ofendita. 'Ne, ni ne havas mortinton ĉi tie. Estas respektinda domo.' Mi salutas kaj foriras.

Sed poste, kiam mi transpaŝontas grandan placon, mi forgesas ĉion. La malfacilo de tiu entrepreno konfuzigas min, kaj mi ofte pensas: 'Se oni konstruas tiom grandajn placojn nur pro petolemo, kial oni ne konstruas ankaŭ ŝtonbalustradon, kiu povus konduki tra la placo. Hodiaŭ blovas sudokcidenta vento. La aero surplaca estas nervoza. La pinto de la urbodoma turo desegnas etajn cirklojn. Kial oni ne zorgas pri silento en tiu amaso? Ĉiuj fenestrovitroj bruas, kaj la lanternofostoj kurbiĝas kvazaŭ bambuoj. La mantelo de la sankta Maria sur la kolono tordiĝas, kaj la torenta aero ŝiras je ĝi. Ĉu vere neniu vidas tion? La gesinjoroj, kiuj devus iri sur la ŝtonoj, ŝvebas.

Kiam la vento retenas la spiron, ili haltas, diras kelkajn vortojn reciproke kaj salute riverencas, sed kiam la vento ree puŝas, ili ne povas rezisti al ĝi, kaj ĉiuj samtempe levas siajn piedojn. Kvankam ili devas firme teni siajn ĉapelojn, iliaj okuloj rigardas gaje, kvazaŭ ĉe milda vetero. Nur mi timas."

Turmentite mi diris: "La historion, kiun vi rakontis antaŭe pri via patrino kaj pri la virino en la ĝardeno, mi tute ne trovas stranga. Ne nur, ĉar mi aŭdis kaj travivis multajn tiajn historiojn, ĉe kelkaj mi eĉ kunagadis. La afero estas do tute natura. Ĉu vi pensas, ke mi, se mi estus sur la balkono, ne povus diri la samon kaj el la ĝardeno povus respondi la samon? Tiom simpla okazo!"

Kiam mi diris tion, li ŝajnis tre feliĉa. Li diris, ke mi estas bele vestita kaj ke mia kravato tre plaĉas al li. Kaj kiom fajnan haŭton mi havas. Kaj ke konfesoj fariĝas plej klaraj, se oni dementas ilin.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/dise.html#pregxisto>

Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Mi sentas solecon de Tero

Ho solecon de Tero mi sentas
En ties orbito poreternas
Vivi sen Suno, Luno ĝi ne povas.

Ankaŭ nian solecon mi sentas
Vivi sen proksimuloj ni ne povas
Tamen daŭre samtiel en soleco
Ni rondiras ĉirkaŭ nia orbito.

Tirana, Marto 2015

Estas io


Estas io kion neniam mi amis,
sed ne povas foriĝi de ĝi
io kiu ĉiam apudrestis
kaj eĉ paŝon ne disiĝis
ankaŭ kiam mi haltis
nek kiam mi irkuris.

Plej intima estas tio
sed ne mia amatino
ankaŭ kiam mi vekiĝas
kaj kiam mi endormiĝas.

le ajn kie mi troviĝas
ĝi min kiel ombro postsekvas
Pli insistema ĝi ja estas
ol mem mia ombro
kio ja ombrigas
nur pro efiko de lumo.

Tiu ombro estiĝas
eĉ en profunda mallumo
tiel mi en ties ombro turniĝas
Redonas mi per fidelo
Neniam min ĝi perfidos
Kaj ĝis la tombo postsekvos.

Estas io kion neniam mi amis
sed foriĝi de tio mi ne povis..



(ENUO)
Tirana, 2016

Turisto venas en Afrikon kaj kiam li estas ekskursanta tra la ĝangalo, li demandas sian ĉiĉeronon:

- Ĉu ni estas sekuraj ĉi-tie? Ĉu ĉi-tie ne estas kanibaloj?

La ĉiĉerono respondas:

- Vi estas absolute sekura. En Afriko ne ekzistas kanibaloj.

La turisto diras:

- Kial vi estas tiel konvinkiĝinta pri tio?

La ĉiĉerono respondas:

- Ni manĝis la lastan kanibalon pasintlunde.

* * *

Kanguruo eskapis el sia ĉirkaŭbarejo en la Londona zoologia ĝardeno. Post la kanguruo estis kaptita, la ĝardenestro konstruis dekfutaltan barilon.

Sekvonmatene la kanguruo ree ĝuis liberon, vagante tra la ĝardeno. La barilo estis plialtigita kaj nun estis jam dudekfuta. Kompreneble, sekvontmatene la kanguruo ree estis for de la barejo. Malesperiĝintaj prizorgantoj de la ĝardeno konstruis 40-futan barilon. Kamelo en la najbara barejo demandis la kanguruon:

- Hej, kiom alte ili plukonstruos la barilon viaopinie?

- Mi opinias, ke ili konstruos eĉ 1000-futan barilon ĝis kiam iu ajn memoros ŝlosi la pordegon...

* * *

Tio okazis en pasaĝera trajno. Patrino kaj ŝia kvinjara fileto sidis ĉe kupefenestro. Antaŭ ili maljuna sinjoro legis "Times".

Ŝajnis, ke la knabo estis ekstreme enuiĝinta, do li turmentis sian patrinon per granda amaso da demandoj. La sinjorino respondadis ĉiujn demandojn tenere rigardante al la knabo kaj ŝajnis, ke ŝi ĝuas

ĉiun minuton de ilia babilado. Kia fiera ŝi estis pri sia etulo! Post ĉiu demando ŝi kisadis la infanon kaj tenere karesadis lian kapon.

- Panjo, - daŭrigis la knabo - vi diris, ke vi estus feliĉa havante dektri knabojn similajn al mi.

- Certe, - respondis la sinjorino kun rideto survizaĝe.

- Kaj ĉu estas malfacile akiri bubon?

- Tute ne, - respondis la patrino. - Vi nur devas iri en apotekon kaj aĉeti kelkajn bubopilolojn kaj du provtubojn.

- Ĉu estas bezonata doktora recepto por tio?

- Absolute ne, - daŭrigis la sinjorino. - Vi nur devas montri al la apotekisto vian edziĝrington.

- Ho, mi komprenas, - respondis la etulo kun evidente plialtiĝanta interesiĝo. - Kaj kio sekvas post tio?

- Vi devas meti la pilolojn kun kelkaj gutoj da akvo en la provtubojn kaj varmigi ilin sur gasformelo...

La maljuna sinjoro, atente aŭskultinta la interparolon, mallevigis la gazeton, forprenis la okulvitrojn, embarase rigardis al la sinjorino kaj ekparolis tremvoĉe:

- Bonvolu pardoni pro mia enŝoviĝo, sinjorino, tamen dum mia junaĝo ekzistis alia metodo, kiu sendube donis la samajn rezultojn! Ĉu oni jam tute rifuzis uzi ĝin? Mi nek estas konservativulo, nek mi emas proklami la avantaĝojn de malnovaĝoj, tamen mi opinias, ke la metodo de mia generacio estis multe pli bona. Ĝi estis la plej perfekta metodo. Mia opinio pri tio estas firmega!

* * *

tradukis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius** el Litovio



Veturmaniero

-- tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Pripensu iomete, kioma estas la plej bona veturmaniero: trairi la tutan vojon per biciklo aŭ trairi la ties duonon per motorciklo je rapideco kvinoble de tiu per biciklo kaj la ceteron surpiede je rapideco la duonon de tiu per biciklo?



Solvo

Por trairi la tutan vojon per biciklo bezonatas malpli da tempo, ĉar tiom da tempo bezonus nur la traigo de ties duono surpiede (je rapideco duonon de la biciklo) al kiu aldonendas la tempo necesa por trairi la duan duonon de la vojo per motorciklo, kiu estas pozitiva kiom malgranda estu ĝi (eĉ se la rapideco de la motorciklo estus ne nur kvinoble sed kia ajn oblo pli granda ol tiu de la biciklo).



Astrologio kontraŭ Psikologio - Decembro / Sagitarioj

Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « sagitarioj »



Korpo kaj sano

Li ĝenerale estas bela viro, alta kaj fortika.

Tiom longe, kiam li vivas sanan vivon li bone fartas.

Li havas la maljunecon, kiun li meritas.

Sportoj, kiuj konvenas al li rajdarto, skermo, atletismo sub ĉiaj formoj.

Kiel li reagas?

La simbolo de la signo estas la vojaĝo, la transigo de la limoj. Paul Eluard diri « oni sentas sin bone nur aliloke ».

Estas en li volo pri progreso, kun solida fono el optimismo. Fido en sia ŝanco kaj en li mem.

Bezonas li grandan aferon, noblajn celojn, ambiciajn strebojn. Fono el religia spirito, eĉ ĉe la plej ateaj, ĉar « endas tamen kredi al io ». Kaj por multaj tio estas rifuĝo.

Li estas ofendiĝema, kaj malbone elportas la kritikojn.

Je kio li taŭgas ?

La sagitario estas komforta en ĉiuj profesioj, kie oni estas en kontakto kun la aliuloj, kaj eĉ pli se ili estas alilandanoj. Li ĝenerale prosperas brile en siaj studoj. Li ĝenerale estas tre sendependamaj malbone elportas la ordonpovon de aliulo.

Kiel li amas ?

La viro de la sagitario havas animon de "pater familias". Li efektivas kun milda sian aŭtoritatecon, kaj ne eĉ venus en lian menson la ideo, ke oni povus ĝin kontesti. Li ŝatas esti ĉirkaŭita kaj konstruas ŝate ampleksan familion.

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

vaksa saŭco. Ni de tempo al tempo manĝu iomete pli malpezajn, dolĉajn aĵojn..." Ĉi tiu vidpunkto kompreneble validas ankaŭ por kino.

Sed mi ne povas nomi ĉi tiun filmon malpeza. Estas grandega perforto sub ĉi tiuj amuzaj eventoj. 12 viroj mortigitaj de maljunulinoj kaj la kadavro de la viro mortigita de la murdisto Jonathan, la krimulo, kiu revenis hejmen jarojn poste. 13 mortintoj entute! Apude troviĝas tombejo. Nigra-blanka ĉirkaŭaĵo. La etoso similas al malnovaj britaj suspensfilmoj (kun tro da murdoj), sed ĉio estas vigla kaj amuza.

Hodiaŭ ni kritikis multajn televidseriojn pro "pravigi kaj normaligi perforton", sed eble en ĉi tiu kunteksto ĉi tiu teatraĵo (kaj filmo) estis unu el la unuaj. Almenaŭ en la 20-a jarcento. Ankaŭ la lokon, kie la eventoj en la filmo estas elmontritaj unu post la alia, ni bone povas nomi frenezulejon. Frenezaj onkloj, freneza onklo, murdisto frato...

Nia situacio en la 21-a jarcento ne multe diferencas de tiu en ĉi tiu domo. Militoj kaj perfortoj estas nur novaĵoj por ni ĉiuj. Ni ŝajne troviĝas en kolektiva subĉiela psikiatria kliniko. Nia konscienco estas sensenta. Ni pravigas la perforton de tiuj, kiuj troviĝas en nia flanko. Ni estas eĉ pli kruelaj ol tiuj maljunulinoj, kiuj mortigas maljunajn kaj solecajn

homojn por eternigi ilin kaj ĉesigi siajn problemojn. Eble ni transformis kruelecon, sangon kaj teruron en plezurobjektojn spektante tiom da sangoplenaj detektivaj filmoj, spektante televidseriojn kaj konsumante detektivan literaturon.

Se vi volas iomete malproksimiĝi de nia mondo, kiu estas teksita per epidemioj, perfortoj kaj malsimpatiecoj, kaj spekti nigran humuraĵon en Usono, en la tempo kun multe pli malalta krimfrekvenco kompare kun la nia hodiaŭ, jen por vi filmo: ARSENO KAJ MALNOVA PUNTO!

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
el Büyükada insulo, Istanbulo, Turkio
23 novembro 2020





MEM, paŝtelo, 1994, 30 cm x 40 cm

En 1994 mia hararo estis malhelbrune kolorigita, glata, brila kaj longa. Mi uzis agrafojn por ricevi ĉevalan harvoston. Antaŭ la frunto la haroj preskaŭ atingis la brovojn. Tiujn harojn mi mem tondis rekte. Ankaŭ kolorigi ne devis la frizistino. Mi kolorigis miajn harojn, ĉar ili estis neĝblankaj. Mi havis nur 49 jarojn. Mi estis tre vanta. La pentristo Rembrandt diris: "Vanta, vanta, ĉiu estas vanta." Multaj artistoj pentris memportretojn.

Konatulino fotis min de la flanko en profilo antaŭ hela vando pere de mia tujbild - kamerao. Tiu bildo plaĉis al mi kiel modelo por bildo. En spegulo ne eblus al mi vidi min profile. Eblus vidi min fronte aŭ trikvarone mian profilon. Kelkfoje volonte mi faris portreton profile. Mi legis, ke la spinaĵo estos esperimita tiel. Ĉe mi: La energia mentono, la batalema eco akceptigi, mian vidon vastan ĉi tie maldekstren. Same la bildo montras mian en si mem ridetantan bonkorecon, kiun mi heredis de mia patro. Simile mi volis interpreti tiun "mem". Mi pentris per paŝtelkretoj sur kremkoloran desegnopaperon 30 cm x 40 cm laŭ la foto kaj laŭ spegula bildo. Por ne viŝi ion, mi komencis de supre maldekstre kaj progresis ĝis suben dekstren - de la haroj - same, kiel mi vidis tion. Kelkfoje mi metis malgrandajn helpopunktojn je helpo aŭ delikatajn liniojn laŭ la distanco, rondedoj kaj entuto. Ĉe mi funkciis la "depretrado", same de sur naturo kiel laŭ fotoj per rigardi, per percepti, desegni, koncentri, desegni, ŝanĝi, plibonigi, depreni, mildigi, fortigi, densigi, vidi, testi, precize rigardi, eltrovi desegni, amplene per okuloj formojn kaj kolorojn studi kaj per krajonoj kaj fingropuntoj kun sento la paperon karesi. Per la okuloj amplene esplorante mi estas pli

sur modelo de la naturo ol sur pentragrundo.


Kelkfoje mi donis "sekretan konsilon": " Mi ne desegnas, mi mankaresas kun respekto kaj komprenemo, amoplene, uzante tiom da tempo, kiom estas je dispono, dum horoj, tagoj, semajnoj, la portreton, tiom longe, ĝis kiam aperas la "animo". Nur portretante laŭ modelo, kiam tempo ne abundas, mi pentras pli rapide. Portreton en DIN A 3 formato farita per paŝtelaj kretoj kutime mi desegnas dum 3 aŭ 4 semajnoj. Dum tiu tempo mi kutimas plurfoje plibonigi, pli koncentrigi la esprimon ĝis la pretigo. En la memportreto mi desegnis multajn harojn fajne de la harradiko ĝis plena longeco. La brilon en la hararo mi atingis per helaj grizaj ĝis helbluaj lumoj. Mia profilo ricevas sian karakterizan esprimon per la energioplena, iom elstara mentono. Por akcenti mian profilon mi apud la haŭtkoloron pro la hela fono metis helgrizajn ombrojn. Tiel mi elektis, por ke la nigra hararo kaj la nigra jako kontrastu pli forte. La lumefikoj venis de la dekstra flanko. Per la nuancita ombrumado de lumo kaj ombro mi povis distancigi la malhelan jakon de la nigra hararo. Tiu hela bevelo de la dorso subtenis la komponaĵon kaj gvidis la rigardon al la orelo. Tiutempe mi portis orajn toroformajn orelingojn. Kelkaj malbelaj harfasketoj, desegnitaj sincere kaj nature, gvidas la okulojn de la rigardanto al la orelornamaĵo. Sub la jako mi portis blankan bluzon. Iam kaj tiam mi rigardis en la spegulon, antaŭ ĉio pro mia hela haŭtkoloro. Fotoj povas trompi, speciale rilate al la kolorvaloroj, kiuj dependas de la lum-kondiĉoj kaj la ĉirkaŭaĵo.

Sekvante la moton "Malpli estas pli!", en la pentrata bildo ĉiam gravas kreemo, ŝanĝemo kaj minimumigo. Emocio kaj esprimo, konstruo de enhavo kaj formo ĉiam eblas en pentrado. Pentrita bildo ofte donas pli fortan impreson ol foto. Post jardekoj, dum kiuj mi kolektis amason da sperto skizante kaj pentrante nur laŭ modeloj, nun miaj bildoj pentritaj laŭ fotoj danke al mia imagkapablo donas pli sinceran kaj vivoplenan impreson ol foto. Tamen, mi daŭre volonte fotas.

Tiu ĉi memportreto respegulas mian tiaman "veran mi" sen plibeligoj. Mi akceptas ĝin kaj mian respondecon pri ĝi. Mi ofte ekspoziciis ĝin. La rekonvaloro estis nepretervidebla.

Ek de 1974 ĝis 1978 mi studis en la Distrikta Kultur-Akademio, Speciala kampo por Pentroarto kaj Grafiko.

Nia docento estis la pentristo kaj grafikisto Horst



Glitzner (membro de la Asocio de la Pentristojde GDR).

Unu de miaj taskoj estis la kreaĵo de studfolio „Manoj“ en formato DIN A2.

Kiel dekstramanulino mi desegnis mian maldekstran manon – haltigi ĝin antaŭ miajn okulojn - en diversajn poziciojn kaj variaĵojn, ankaŭ same kiel per variaj desegnoj – per kraĵono, nigra kreto kaj ruĝeta - okra paŝtelkreto.

Pri tio mi devis konsideri la anatomion de la ostoj kaj artikoj kaj ĝiaj rilatoj inter ili - la laŭlongeco, laŭlarĝeco.

La plej belo ĉe la pentrado kaj desegnado ja estas la ekzakta, preciza alrigardo kaj tion ĉi tie rigardigi



sendis Helga Plötner portretistino el Germanio

La Turka Ĉefgalero

1. La verkisto



Ĝan Anton Vassallo naskiĝis en La Valeta la 5an de junio 1817. Li bone scipovis la maltan, la italan, la latinan la araban kaj la francan lingvojn. Li estis juristo, profesoro de la itala ĉe la malta universitato kaj verkisto pri la malta historio. Li mortis la 28an de marto 1868.

La epikon “Il-Ĝifen Tork” (La Turka Ĉefgaleron) li verkis en 1842;

2. La Temo



Ĝi temas pri la galero nomita, laŭ la tiutempa itala kulturo de Malto: “La Corona Ottomana” (La Turka Krono). Laŭ la rakonto, ĝi velveturis al la insuloj de la greka arĥipelago por kolekti la jarajn impostojn pagendajn al la Turka Sultano. Sur ĝi servutis nombro da maltaj, siciliaj kaj grekaj sklavoj.



Unu tagon, kiam ĝia reganto Paŝao Aplin-Ŝerin kun sia sekvantaro elŝipiĝis, la sklavoj ribelis, gajnis la kontrolon de la ŝipo kaj

verkis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

rapidirigis ĝin al libereco, celante atingi la maltan havenon.

Sekve, post dek-ok tagoj da navigado, la “Krono” atingis Malton.

Sultano Mustafà III, kiu tiutempe regis Konstantinopolon, koleregis,



minacante, ke, se oni ne returnus la galeron, li atakus Malton. Pinto, tiutempe Grand Majstro de la Kavaliroj, ne volis cedi. Feliĉe, la franca reĝo Ludoviko XV tuj alhelpis kvietigante la Sultanon: li aĉetis la galeron kaj sendis ĝin al la Sultano, kio okazis en 1762.



3. Ĝia valoro

La poemo estis verkita en simplaj maltajlingvaj versoj sen komplikaĵoj, kvankam per tre belaj pentritaj bildpaneloj, kaj dividita en tri Kantoj; ĝi entenas 116 sesversajn strofojn, prezentante la rimon: ABCBDD kaj temas pri vera historia evento okazinta en 1760, t.e. 82 jarojn antaŭ la verkado de ĉi tiu poemo.

Sufiĉas legi kelkajn versojn por certiĝi pri tio. Ekzemple:

El la Unua kanto:

*La ŝipo estis la plej admirinda
El tiuj de l'Sultano, grandvalora.
Ĉarmige rava estis ĝi, altpreza,
La Ĉefa sklavigejo plej kolora
Interne kaj ekstere laŭ la plaĉo
De l'Estra delikata gustosaĝo.*

*Ĝi grandiozis. Kaj en ĝia pompo
Similis ĝi al reĝo surondara.
Per sepdek ok flambuŝoj la ĉirkaŭon
Skuis la turka supereco mara.
Nur sepcent kvindek la persona kvanto;
Aplin-Ŝerino, la ĉefkomandanto.*

El la Dua kanto:

*'Malto! Malto!' apenaŭ la oldulo
Povis ekkrii pro l'eventkontento.
Kiel la kor' ripozas post doloro,
Tiel el brustoj jen suspirlamento.
Ĉi tiu ĝojo ilin kuraĝigis
Kaj al l'okuloj larmi jam instigis.*

El la Tria Kanto:

*Ankoraŭ noktis. Sed la promesintoj
Vekiĝinte atendis por foriri,
Ekkiam la aŭroro paradiza
Ekvokos ilin ĝoje ŝin admiru.
Marŝinte al la loko kun fervoro
Ili kuniĝis tuj post duonhora.*

Malantaŭ la rakonto kaŝiĝas simbolsignifo. La rakonto bildigas longan batalon, kiu finiĝas per la venko de la libereco super la sklaveco. Tiuj estis aliaj tempoj, kiam la mediteranea maro servis kiel batakkampo inter la Kavaliroj de Sankta Johano, krome nomitaj « La Kavaliroj de Malto » kaj la Turkoj. Sufiĉas nur nomi unu el la elstaraj tiutempaj bataloj, nome « La Granda Sieĝo de Malto, 1565 » por informi pri la graveco de la tiutempaj ambaŭflankaj, ĝismortaj bataloj.

Post Vassallo, aliaj maltaj aŭtoroj verkis epikojn sed tute ne samspecaj. Ekzemple Dun Karm, per sia longa poemo: "La 'Mio' kaj ĝia Pretero", verkis ne pri space historia temo sed pri sia interna sperto. Alia verkisto -- kaj gramatikisto -- Ninu Cremona verkis dramon epikon pri okazintaĵo dum la malta feŭda epoko.

La epika valoro de "La Turka Ĉefgalero" estas nepre beletra, estante la unua tiuspeca en la popola malta lingvo. Do per ĝi Vassallo akiris la meriton esti la pioniro de la malta epik-verkado.

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

Du rakontoj pri hundoj

tradukis kaj sendis Rola Platteau el Francio

*Jen du faktoj, kiuj okazis en la jaroj 1950-aj:
unu en Italio, la alia en tiam franca Gvineo.*

(1)

En urbeto de l'itala kvazaŭinsulo, hundo iradis ĉiuvespere samhore ĉe la bushaltejo, esperante, male je ĉia espereblo, vidi elveturantan sian mastron..... kiu estis mortigita dum la lastfinita 2-a Mondmilito. Tion li faris dum kelkdek jaroj.

La fakton raportis ĉiuj la tiamaj gazetoj.

(2)

La Hundo en Konakrio *

Ŝipojn atendadis la Konakri-a hundo. Neniu scias pri ĝia nomo, nek nomon de l'mastro, kiu, finiĝintan sian kontrakton, forlasis sian hundon por reiri Francujon. De tiam la hundo ne forlasis la havenon, kie ĝi estis fariĝinta iom fama. Vivante, same kiel ŝia itala kolego, per la publika donemo, ĝi same pasigis la li restantajn vivjarojn je atendi la revenon de la sendankulo.

Tuj kiam pasaĝerŝipo aŭ varoŝipo estis anoncita, ĝi alkuriadis kaj salutis ĝin per siaj bojoj.

lom da tempo poste, lokita piede de la elŝipejo, tremetante per senpacienca kaj ĝojo, baldaŭ elrevigotaj, ĝi flaradis unu post la alia la pasaĝerojn, ĝi fiksdirektis al ili sian angoran rigardon, persvadita, ke ĝi finfine vidos ekaperi tiun, kiu estis perfidinta ĝin, kaj al kiu ĝi estis jam pardoninta.



Jean Prieur « La animo de l'bestoj »
1986 p. 85-86

* **Konakrio** (oficiala formo *Conakry*, malnova formo *Konakry*) estas ĉefurbo de Gvineo (iama franca Gvineo) kun loĝantaro de ĉirkaŭ 1,8 milionoj, tiel ĝi estas la plej granda urbo de la lando.

esperantigis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

(humuraĵo)

Vendrede en kulturpalaco oni aŭdas bruon, tumultas homoj, sonas kanto. La melodio estas malnova kaj enua, sed vortoj estas bonaj kaj justaj :

... *Esperanto estas la lingvo por ni, por ni ...*

Mi observas tiujn homojn, ili plaĉas al mi ... Niaj ! Min kaptas entuziasmo, mi kvazaŭ akiras flugilojn kaj flugas kanto en mia koro. Kaj tio okazas ĉiun lastan vendredon de la monato. Dum klubaj kunvenoj regas bonhumoro kaj ni parolas pri diversaj internaciaj kaj lingvaj temoj. Kaj neniuj ĝenas nin, neniuj kontraŭas, ni furoras kaj sinprezentas.

- Mi opinias, ke Esperanto baldaŭ venkos,- diras Pranas, eksa klubgvidanto.

- Kaj poste? – demandas Kazinjo. – Kio okazos tiam, kiam Esperanto venkos?

- Ni vivos pli bone, - aldonis kasistino Aldona.

Ĉiuj ekcerbumis pri veraj valoraĵoj de la vivo.

- Kio estas celo de la vivo ? - demandas Rimas.

- Mi, ekzemple, ne povas vivi sen vivocelo, - diras Petro, serĉante ion en pantalonpoŝoj .

- Do vi ne vivu, - instruas Rimas, - neniuj bezonas ĝin, la vivocelon.

Petro kontraŭdiras :

- Mi havas celon: instrui Esperanton, altiri ĉiujn novbakitajn esperantistojn al kluba agado. Mia celo estas : tuta urbo - la granda esperantista komunumo.

- Tamen kio estas ni – esperantistoj? - ekdubas Kazinjo.

- Instruistoj, artistoj, laboristoj, pensiuloj, gelernantoj ... – daŭrigas Rimas.

- Trankviliĝu, - interrompas Sofio. - Se ni ne atingos nian celon, neniuj punos nin.

- Pro kio tiam ni penas ?- interesiĝas Kazinjo .

- Tial, ke ni estas stultaj, - interrompas Rimas. - Tiuj, kiuj penas – malhelpas aliajn.

- Tiam mi neniam penas, - decidis Kazinjo.

Kaj Paŭlo, la nuntempa klubgvidanto, diris tiel :

- Veron mi diros al vi : Esperanto devas esti apogilo al ni dum tuta nia vivo.....

- Ĝuste tio timigas min, - aldonis Aldona, - ĉar por Esperanto mi elspezas monon kaj ricevas neniun profiton...

-kaj ĉiu esperantisto, ĉiu el vi devas plenumi vian mision : perfektigi anime, esperantigi gefamilianojn, bopatrinojn kaj aliajn proksimulojn, - daŭrigis Paŭlo . – Kaj neniun profiton ni atendu, nia

devo estu diversmaniere subteni Esperanto-movadon.

Ĉiuj ekstremis kaj ne rimarkite flanken turnis sin for de Paŭlo. Kaj la vero - for de ni.

- Ĉiu esperantisto devas restigi en vivo la spurojn, - daŭrigis Paŭlo.

- Neniajn spurojn. ... Oni venos kaj mortigos nin, ... - ĥore Paŭlon interrompis la klubanoj.

- Mi diris kaj mi jam iros, - diris Paŭlo kaj forlasis kunvenon.

Ni ĉiuj interrigardis unuj la aliajn, kapjesis kaj konsentis, ke vivo de esperantistoj estas danĝera kaj malfacila : oni devas vivteni familion, pagi membrotizon al kluba kaso, viziti klubajn kunvenojn, aĉeti kaj legi Esperantlingvajn librojn, aboni E-periodaĵojn...

Kaj tuj iĝis pli gaje.

Al la kunvenoj de nia Esperanto klubo ni invitas ankaŭ veteranojn de esperantista movado. Hodiaŭ en nia klubo gastis veterano Pranas, iam li estis longedaŭra kluba gvidanto. Nun pro la aĝo kaj sanstato li vivas per rememoroj. Maljunulo Pranas tiras el la teko taglibron, permane forviŝas polvon, malfermas ĝin kaj listigas. Poste li diras: - Hodiaŭ, estimataj geklubanoj, mi finlegos al vi la lastajn paĝojn el la dek sepa kajero de mia taglibro.

- Legu , estimata , - instigas geklubanoj.

Maljunulo gustumas teon, ektusetas kaj komencas : „...Hieraŭ venis en mian hejmon Mikas kaj demandis : -Kion utilan por Esperanto vi faris hieraŭ ?

Mi respondis : - Mi verkis artikolon pri Esperanto kaj enmanigis ĝin al redaktoro de loka gazeto, aŭskultis disaŭdigon de Pola radio en Esperanto.

-Kaj hodiaŭ? - demandis Mikas.

- Hodiaŭ mi legis „Litovan Stelon“, „Heroldon...“, „La ondon...“,

- Kaj morgaŭ?

- Morgaŭ ... morgaŭ estos dimanĉo, ... mi skribos leterojn al miaj leteramikoj.

Kaj Mikas diris : -„Malmulton vi faras por Esperanto ...Vi kompromitas Esperanto movadon , vi malbonodoras... Vi ja plenumis vian rolon,liberigu la postenojn por aliaj...“

- Ĉu tio okazis vere ? – indigniĝis nuntempa sekretariino Valerija.

Aperis pliaj malkontentaj geklubanoj, ĉar ili nenion sciis pri la pasintaj tempoj el la kluba vivo. Tamen ekkoni la movadon tia, kia ĝi estis tiam, rajtas ĉiu geklubano.

Kazinjo ne sintenas kaj diras al Mikas : „ - Nu,



nu ! Vi almenaŭ iom hontu. Vi ne sentu vin tiom grava, por ke ĉiuj timu vin. Kio estas vi ? Aŭtoritato ? Deputato, direktoro, ministro...? Al mi ŝajnas, vi estas fekaĵo.

Mikas ne sukcesas vicigi siajn pensojn ,sed li ne perdas sinkontrolon.

- Vi politikumas ? - demandas li. - Tio estas la malsano de nuntempo. Sed mi povas vin sanigi... Forpeli iun ajn trans la horizonton mi sukcesos ĉiam ...

Irinte al Pranas, Mikas salutis lin kaj ĝentile, sed severe ekpostulis : - Ne plu skribu vi!

- Sed pro kio? - demandis Pranas.

- Pro tio, ĉar neniu legos, neniu bezonos tion. Kaj al vi nek honoro, nek mono ... Ĉu vi povas fari ion utilan por Esperanto? Almenaŭ...

- Bone vi diras, - ĝojplenas la veterano. - Mi eĉ ne ekpensis pri tio. Mi forĵetos la plumingon. Ne plu verkos mi.

- Ne nervoziĝu, pacience vivante eble eĉ centjariĝon atingos vi , - daŭrigas Mikas .

- Inter la komencantoj vi sidiĝu, vian sperton disdividu. Kompreneble, ne interese tiel vivi, sed kiam oni al kutimiĝas, nenion oni rimarkas. Kaj oni povas tiel pasigi tagon post la tago. Mi scias, kion mi diras, - finis sian paroladon Mikas.

Kluba prezidanto Paŭlo diris tiel: - Veteranoj grizharaj estas simplaj, bonaj homoj interalie, kaj ili deziras al ni nur bonon, kvankam ni tion ne meritas. Ĉu ni ofte trovas bonan vorton al veteranoj? La vivo de Pranas ne estis facila. Li scipovas legi kaj paroli Esperanton. Dum la malfacila tempo de ruĝuloj, Pranas firme tenis enmane la stirilon de esperantista movado kaj pro tio meritas li estimon de nuntempuloj. Tamen ne elektante tiujn ĉi meritojn, lin turmentis la vivo, persekutis malamikoj kaj punis la Dia fingro ... Poste ni restos niaj laboroj. Ni estu justaj... - finis Paŭlo.

Tuj ekaperis pormomente la kompreno, ke harmonio en tiu ĉi mondo mankas .

- Kion vi volas? - balbutis Mikas. - Kion signifas

tio? Kiel vi tedis al mi! Jen mi tuj foriros. Kaj agu vi laŭ via bontrovo...!

- Mi ekŝercis, - post ioma paŭzo daŭris Mikas kaj eksidis.

Ĉiuj interrigardis unuj la aliajn, sed nenion respondis. Pranas kontenta balbutis ion en fuŝita Praesperanto kaj klakis per kariigintaj dentoj.

En nia Esperanto klubo okazas ankaŭ renkontiĝoj kun famaj esperantistoj: profesoroj, doktoroj, aktoroj ... Pasintfoje gastis ĉe ni en klubejo profesoro Salomono, kiu klarigis al ni la sencon kaj esencon de esperantismo.

„-La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo Esperanto, kiu donu al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝi inter si, - komencis la profesoro. - Nur esperantismo, nur sola ĝi plenplenas je optimismo. Necesas, ke ĉiu esperantisto eksentu la guston de esperantismo. Por atingi celon, taŭgas ĉiuj rimedoj. - daŭrigis profesoro. - Komence naskiĝis la Interna Ideo, poste ĉio alia: neŭtralismo, sennaciismo, homaranismo, finvenkismo k.t.p.“

Profesoro parolis daŭre kaj enue. Ni komprenis nenion, tamen estis tre interese. Poste profesoro parolis pri klereco kaj moralo, tamen misvagis al malproksimaj, senlumaj spacoj. Tiam ekstaris Mikas kaj serioze diris: „

- Por esti klera - la supera klereco ne estas bezonata. Ni perfektigiĝas ĉi tie, en nia klubo. Kaj ni estas kontentaj“.

Tion aŭdinte ĉiuj klubanoj gloris lin. La profesoro iomete ripozis, ektrinkis kafon kaj plu parolis :

„- Restis ankoraŭ unu ne plenumita tasko kaj mia misio estos finita.“

Tamen kio estis tiu tasko li ne memoris kaj demandi pri ĝi ni hontis... Profesoro Salomono kolektis ĉiujn siajn aĵojn kaj foriris.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

32>> la kokoj anoncanta la mateniĝon, tiam ĉiuj iras dormi.

Recepto de la ĉefa litova manĝo dum Kristnaska antaŭvespero.

Prĕskuĉiai (preskuĉej) - farunbuletoj estas bakitaj el saligita pasto de tritika faruno, iom pli malmola ol pasto por kuko. En la paston oni enmiksas papavajn grenojn kaj sukeron, giston. Por ke la buletoj estu pli fragilaj, oni enverŝas iom da oleo. El la pufiĝinta pasto oni formas maldikajn bastonetojn kaj distranĉas ilin je pecetoj grandaj kiel avelo, t.e. po 1,5 - 2 centimetroj. Oni bakas la buletojn en forna bakujo

kaj manĝas kun papava lakto.

Papava lakto. Lavitajn papavgrenojn oni brogas per akvo, filtras kaj en speciala ujo pistas per hakila tenilo. Poste oni surverŝas varman boligitan akvon. Post unu-du horoj oni denove filtras ilin tra densa lina ŝtofo, aldonas sukeron aŭ mielon. Fariĝas fluaĵo simila al lakto. En tiun lakton oni mergas prĕskuĉiai kaj manĝas la tuton simile kiel supon.

Laŭ libro de J.Kudirka verkis Vytautas Šauklys
LITOVA STELO, numero 6. 1998, nov.-dec.

Fonto: **Legolibreto 2** de Jindřiška Drahotova

Sed nun vesperiĝis.
Ni fermu la pordon
kaj mallevu la kurtenojn
ĉar venis la tempo de kontado.

Kion ni faris en nia vivo?
Kiuj ni estas?
Kial vi kaj ne mi?

Estas longa tempo,
ke neniu frapis nian pordon
kaj la poŝtisto
ne aperis ekde jarcentoj.

Ho! Kiom da leteroj,
kiom da poemoj,
kiujn foprenis la vento de novembro.

Kaj se mi malŝparis mian vivon,
mi malŝparis ĝin por sensignifaj
aferoj:
iu vorto aŭ iu ŝlosilo,
iu hieraŭo aŭ iu morgaŭo.

Tamen miaj noktoj
havas ĉiam iun aromon de violeto
ĉar mi rememoras.

Kiom da geamikoj, kiuj foriris
sen lasi adreson,
kiom da vortoj senrespondaj,
kaj la muziko mi pensas,
ke ĝi estas la ĉagreno de tiuj,
kiuj malatingis enamiĝon.


Ĝis en la fino restas nenio,
sed nur iu malklara memoro
el la pasinteco
(kiam ni vivis?)
kaj en ĉiu venanta printempo
mi ploras ĉar baldaŭ ni foriros
kaj neniu rememoros nin.

-- de **Tasos Livaditis***, el Grekio
el "La skriptoj de aŭtuno"
(Τάσος Λειβαδίτης)



fonto: <http://www.c-andronis.gr/fragments/anemos-tou-noemvriou-tasos-leivaditis/>

* *Tasos Livaditis estas greka poeto kaj maldesktrema verkisto, kiu multe suferis pro siaj pensoj. Liajn*



poemojn multe uzis la fama komponisto Mikis Teodorakis en siaj komponaĵoj

Ŝercoj



Leporeto iras en vendejon kaj petas du karotojn de la urso.
— Mi ne havas karoton — respondas la urso.

La leporeto malgaje foriras, sed post du horoj ĝi revenas.

— Mi petas du karotojn — ĝi diras.
— Mi ne havas karoton kaj se vi denove petos karoton mi ĵuras, ke mi vin per martelo mortbatos kaj donos vin al la hundo kiel vespermanĝo.
La leporeto foriras, sed post du horoj revenas.
— Ĉu vi havas martelon?
— Ne, mi ne havas martelon.
— Ĉu vi havas hundon?
— Ne, mi eĉ ne havas hundon.
— Tiam mi petas du karotojn.

Kiel bruligi la orelon de karabenisto?
(itale: Carabiniere)
Estas simple: telefonu al li dum li estas gladanta...

EDZIĜO NE PLENUMAS LA ESPEROJN

Virino edziniĝas al viro esperante ke li ŝanĝiĝos. Li ne ŝanĝiĝos.

Viro edziĝas al virino esperante ke ŝi ne ŝanĝiĝos. Sed bedaŭrinde ŝi ŝanĝiĝos....Nu, kompreneble, ne ĉiam.

DUM LA LASTA PEKINA KONGRESO

Okcidentano demandas pekinanon neesperantistan:
When do you have elections? La pekinano ruĝiĝas.
Tamen post iom da hezito respondas: Evly molning.



Preĝo de la artisto kaj la poeto (EKRA2020)

| | | |
|--|---|---|
| Dankon, Sinjoro, Dio de la Universo! | el kie venas Via Dia LUMO kaj la Gracoj de l' Sankta Spirito. | Estu Via nomo laŭdata, por ĉiam! Amen! Sinjor'! |
| Pro la Naturo, frukto de Via AMO. | Dankon, Sinjoro, pro la Laboro de l' Kreado! | konkursajo de Maria Otilia el Niteroi , Brazilo |
| Pro la Tero, kiu estas tiel bela kaj plena de perfekteco! | Vi donacis al la Homo la Paradizon, kiu induktas al la inspiro de l' Artistoj kaj Poetoj | dua premio pri poezio en EKRA 2020 EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abritus" |
| Pro la maro, ĉi tiu giganto, kiu banas kaj purigas la animon! Pro la ĉielo, | turnitaj al la Belartoj kaj al la poeziaj trezoroj. | |

La truto marko (EKRA2020)

Mi estas maljuna homo, kaj komencis perdi el rememoro multajn okazaĵojn el pli junaj tagoj. Tempo de la naŭa dekada viŝis multajn rememorojn. Oni povas diri ke mi estas en feliĉa edzeco pli ol kvardek jaroj. Nun ni havas la genepojn, kaj mia edzino kaj mi estas emerituloj. Do, normala familio. Ni, mia edzino kaj mi konzervis sanon, ni estas sanaj laŭ jaroj.

Ni ofte parolas pri pasinteco. De tempo al tempo mi rememoras ŝercemajn okazaĵojn. Tiamaniere ni ekrakontos unun okazaĵon el la unuaj jaroj de nia edzeco. Tiu okazaĵo mi rakontis ĉe nia filo kiu festis sukcesan doktoriĝon el la ekonomiaj sciencoj.

Do, tio okazis ĉitie.

Ni, mia edzino kaj mi tiam estis juna geedza paro. Ni atendadis nian la unuan infanon. Hodiaŭ ni povus diri ke tio estis nia filo nuna doktoro de ekonomiaj sciencoj. Tiam, ni, mi kaj mia edzino, estis nur ektimigita juna geedzeca paro kiu kun la timo kaj la ĝojo atendas sian la unuan infanon.

Mia patrino, kiu tiam atendas la unuan genepon, diris al mi ke gravedaj virinoj estas aparte sentemaj. Malnova kutimo estas ke al tiaj virinoj, gravedulinoj, oni devas plenumi ĉiujn raciajn dezirojn.

Mia edzino diris ke ŝi dezirus vespermanĝi fiŝon. Ŝia deziro estis ordono por mi. Mi, kiel bona edzo, tuj ekiris en vendejo de fiŝoj kaj petis freŝajn fiŝojn.

Vendisto, mia konato, donis al mi iu sitelo kun akvo kie baraktis la viva truto. Li diris al mi ke ĵus matene estis aldonita en lia akvario kaj fiŝo estas freŝa kaj bona. Mi pagis tre kontenta kaj ĝoje iris hejmen.

Mi devas diri ke mi estas fiŝkaptisto dum libera tempo. Aŭ, ni estu preciza, kelkaj miaj konatoj kaj mi ŝatas sidi sur bordo de la rivero, trinketi bieron kaj interparoladi. Fluado de akvo estas trankviligita, tio estas terapio por ni poste semajna laboro. De tempo ĝis tempo ni fiŝkaptis iun fiŝon, sed tre malofte. Se ni ion fiŝkaptis tion tuj finfinis sur rostokrado.

Mi alvenos hejmen kaj truto en sitelo ankoraŭ movas per vosto. Mi elprenis ĝin el sitelo kaj metis sur kuireja plato kie mi deziris prepari ĝin por rostilo.

– Ĉu vi vidis ke li estis viva? – demandis mia edzino kiu alvenos rigardi mian kuirejan laboron.

– Kompreneble, ĉar mi portis nur la plej freŝa fiŝo por mia amata edzino – respondis mi preparante tranĉilon.

– Kion vi diris? Vi volus murdi ĉi tiun fiŝon!? Mi tion malpermesu al vi! – diris mia edzino kaj denove metis truton en sitelo. – Oho, kiel li ĝojas pro tio ke denove estas en akvo! – entuziasmigis ŝi karesante truton en sitelo. – Mi nomos lin Marko! – konkludis ŝi.

Tiam ŝi denove ekrigardos min: – Vidu kiel bela li estas! – krivokis ŝi dorlotante momente fiŝon.

– Ĉu vi frezeziĝis? Kia Marko, por nomo de Dio?! Tio estas fiŝo por nia vespermanĝo! – ekribelis mi. – Cetere, de kie vi scias ke tiu fiŝo estas viro? Ĉu vi frezeziĝis? – mirigis mi.

– Vere, Marko ne estos nia vespermanĝo vespere! Kaj neniam! – tute serioze kaj tre energie diris mia edzino.

– Sed vi, kara mia virineto, volis havi fiŝon por vespermanĝi! Mi multekoste pagis ĉi tiun truton!

– Ne, ne! Mi decidis – la truto Marko ne estos mia aŭ nia vespermanĝo! Iru en vendejo, aĉetu fiŝfileoj! – severe rigardis min mia amata edzino. –

Plenu sitelo per freŝa akvo, ni devus kunporti Marko-
n ĝis rivero!

– Ĉu vi scias kion vi diris? – demandis mi, sed
ŝi ne permesis plian interparoladon.

Mi rememoris ke mia patrino diris al mi ke mi
devus realigi ĉiuj realaj deziroj de gravedulino. Tio
signifas ke mi devas prepari fiŝon de kiu mi
multekoste pagis, kunporti en rivero. Ĵus estas feliĉa
ĉi tiu truto kiun mia edzino nomis per tiu ofta ĉe ni
nomo – Marko.

Mi pripensis ke mi povus truton denove redoni
al vendisto kaj mi tion proponis al mia edzino. Sed, ŝi
freneze respondis:

– Ho! Mi ne kredas al vi! Vi denove, verŝajne,

dezirus vendi fiŝon, aŭ doni ĝin al iu via kamarado el
via fiŝkaptada aventuro. Mi iros kun vi kaj mi dezirus
adiaŭi de Marko.

Vespero estis bela, kvankam pasis dudeknaŭ
horoj. Tiam mi, eskortita de nia „pli bela duono“
piediris ĝis rivero.

Poste, mi ankoraŭ devas spekti ke mia
multekoste pagita vespermanĝo foriris en la riveraj
profundojn.

konkursajo de **Dimitrije Janičiĉ** el Belgrado, Serbio
tria premio pri humuro en EKRA 2020
EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abritus"

La kapreoleto de maljuna onjo

sendis Adri Pásztor el Hungario

*Sur vilaĝgrand', Matro-suba,
loĝas onklin' tre maljuna,
venas de ŝi ĉia belo,
ankaŭ tiu-ĉi fabelo:*

*Kapreolo, la id' ĉarma,
irante sur voj' arbara;
stumbliŝ ĉe falinta trunko
kaj rompiĝis ŝia kruro.*

*Plende ploras kompatinde,
maljunulin' iras tien;
bedaŭras, surbrakon prene,
hejmenportas ŝin zorgeme.*

*Ĝin ŝi flegas kaj dorlotas,
freŝan fojnon manĝi donas,
kvazaŭ estus ŝi patrino,
kaj la eta – ŝia ido.*

*Cili kato, Bodri hundo
al ĝi kuŝas en angulo,
ja kunsenton ili havas,
la gasteto ne ĝenatas.*

*Ŝi saniĝas jam bonŝance,
volus kuri, salti dance;
tamen ĉe la eta ido
forestas la gaja vido.*

*La okuloj tre malĝoje
vidas ke la montoj fore
bel-aspektas, kiel oro,
dank'al suno de l'aŭroro.*

*Vent' vespera nubojn portas,
montoj, valoj, jam alvokas:
"Vin atendas kampherbeto,
-- venu hejmen, amiketo."*

*Idokule larmoj sidas,
hejmeniri tre aspiras:
vane patrin' ne atendus,
se forlas', facila estus..*

*Tage-nokte ŝi sopiras,
en la sonĝo hejmen spiras;
ŝin vokadas cent da floroj,
pli-abundas ŝiaj ploroj.*

*Saltas sciur' sur arbego,
frapetadas bunta pego,
voĉ' kukola gaje sonas,
idojn formikaro portas.*

*Akvo, vento ŝin atendas,
la ĉielo nubon tenas,
bluas kampanula tero,
vokas la trikoloreto.*

*Bona onjo ege ploras,
tamen ŝi ĝin ne retenas.
Kapreol' ne estas homo,
ne vivu do en la domo.*

*Ĝis la pordo kun ĝi iras,
onjo kara – kore diras:
„Estu do laŭ via volo,
Fartu bone, kapreolo! ”*

*Repaŝetas, ŝi silentas
la fenestro nun tintetas:
el dom' atentus avinjo,
ĉu rerigardas la ido?*

*Maldankema eta besto,
kvazaŭ irus ŝi al festo;
muska roko survoj' altas,
kiel fulmo ĝi sursaltas.*

*Sed surkreste, montopinte
adiaŭas sinturninte:
„Estu benataj kamp', vepro,
kaj forkuras kiel vento.*

*Pasis somer', foli' flavas,
fagarbo jam ĝin delasas,
domon, kampon neĝo kovras,
la maljunulino solas.*

*Ĉio floras post la vintro,
ne forgesatas la ido.
Jam la dua jaro pasas –
je la pordo iu frapas.*

*„Kiu povas nokte veni,
kiu kion volas de mi?”
Lunbrilas al vilaĝfino
pardon malfermas la avinjo.*

*Ĝoje brakojn ŝi etendas:
tie fil' kun panjo estas,
enlasas ilin, en la domo
varma estas la renkonto:*



Patrin' estiĝis la ido,
revenis kun sia filo
al malsanulej' avinja,
ĉar rompiĝis kruro fila.

Matro-sube vilaĝ-rande,
avinjo sidas ĉe porde;
ŝi laboras, ne solecas
dum ekstere frostas, ventas.

Peĉjo portis la unuan,
donis Julinjet' la duan,
Katerina la alian,
belon, ĉiu havas ian.

La okuloj brile petas,
la konduto ĝin ripetas:
„Onjo kara, lin kuracu,
lian kruron mole pansu!”

Kapreoletojn amase
ŝi sanigas, ĉiam ame,
dum somer', kaj ankaŭ vintre;
ili venas, ŝin fidinte.

Florojn akompanas kantoj
de la etaj vizitantoj;
la infanoj kantas ĥore,
avinjeto ridas plore.

Kiel nokt-fantoma ulo
malaperas en nebulo.
Onjo flegas la etulon,
fiksas multole la kruron.

Amas ŝin la vilaĝanoj,
ŝin karesas ĉies manoj,
kaj „Kapreola avinjo”
estiĝis ĝi ŝia nomo.

Sur vilaĝrand', Matro-suba
loĝas avinjo maljuna,
ŝia kara personeco,
gardatas en la fabelo.

Baldaŭ lia san' revenas,
sur monteton allametas;
je kiam glan' alteriĝas,
la etulo hejmen iras.

Diant', salvi', papavero
floras en ŝia fenestro,
en terpotoj, en tasetoj
multkoloras cent bukedoj.

Por bestetoj - salaj panoj,
kukoj pretas por infanoj.
Estu gasto ĉe avinjo! –
De l' fabelo jen la fino.

Poemo de **Anna Fazekas** * el Hungario

Esperantigis: **Adri Pásztor** kaj **D-ro Endre Dudich** kristnaske 2006

FELIĈAN NOVJARON !

* **Anna Fazekas** (Fazekaŝ) naskiĝis en Budapeŝto. Ŝi estas fratino de la historiisto Elizabeta Fazekas. Anna abiturentiĝis en Budapeŝto, poste akiris diplomon je kuracgimnastikisto. Ŝi kuracigis kaj pubertajn-, kaj plenkreskulojn. Dum la 1924-a jaro ŝi enŝaltiĝis en la laboristo-movadon, pro kio oni deportis ŝin en 1944.

Ŝiaj kelkaj poemoj aperis en „ESTI KURÍR” (Vespera Kuriro), poste en la ĉemetaĵo dimanĉa de la PESTI HÍRLAP (Gazeto de Peŝt), kaj ankaŭ en memstara volumo en 1949. Ŝi estis lektoro ĉe la eldonejo ATHENAEUM, krome inter 1952-1963 direktoro de la JUNULARA-, respektive de la Eldonejo MÓRA. Ekde 1950 aperis ŝiaj versaĵaj fabeloj por infanĝardenanoj kaj tre junaj lernejoj en memstaraj volumoj, parte en kolektaĵoj, kaj poemoj skribitaj en faldfoliojn kaj kolorigkajerojn.

Ŝi tradukis infano-poemojn por la eldonejoj EŬROPO kaj de MUZIKVERKAĴOJ, elektitajn versaĵojn kolektis el fabeloj de Andreo Fáy.

La Kapreoleto de olda onjo aperis unue en 1952.

Anna Fazekas mortis la 2-an de januaro en 1973.

(Laŭ indikoj de Google-informoj de scienca

kunlaborantino sinjorino Ilona Böde)

Mátracered estis hungara vilaĝo ĉe montaro Mátra. Dum la timoplana, animpremaj jaroj de la dua mondmilito, tie la tiama juna pedagogo somerumigis kvindek infanojn. Malgranda paca insulo estis ĉi tiu tendaro dum tiuj jaroj.

Multoj: infanoj kaj plenkreskuloj vizitis ĝin, ĉar la juna Anna Fazekas kreis tian etoson, ke ĉiuj estis ĝojaj en sia proksimeco. Al pliaĝuloj ŝi donis utilajn konsilojn, kun la infanoj ŝi ekskursis, animalojn nutris kaj po vesperoj ŝi kantis belegajn popolkantojn el kolektoj de Adalberto Bartók kaj Zoltán Kodály, kune kun la vilaĝaj infanoj.

Post la dua mondmilito Anna Fazekas foje rememoris al sia infantendaro en sia ŝatata montaro Mátra. Tiel naskiĝis la fabeloj: Kapreoleto de Olda Onjo – Kapreolavinjo.

Ĉi tiu, nun aperanta esperantolingva eldono – pere de la Hungara Elektra Biblioteko – estas ĝia unua esperant-lingva traduko.

Ni dankas la konsenton, permeson de sinjorino Eva Gerő, posteulino de la verkistino Anna Fazekas, pro la esperantolingva aperigebleco.

Sinjorino **Adri Pásztor** kaj **D-ro Endre Dudich**

Mi estis okjara kaj ekiris lernejen. Tio estis en 1942. Unua dekreto instruistina: de nun vi ne plu rajtas paroli la italan lingvon. (Tiam prezidento - diktatoro! - malpermesis paroli la lingvojn de la malamiko: germanan, italan, japanan). Sed Frida (kiu parolis germane) tuj instruis nin. Ŝi donis ekzemplojn... el kiuj mi konkludis:

Substantivoj finiĝas per -o.

(negrave, ke tiam mi ne sciis kio estas substantivo). Do facila afero. Reveninte hejmen, la patrino antaŭ la pordo atendis min:

– Ĉu vi ŝatis la lernejon? la instruistino? Kion vi jam lernis?

– Ke ni ne plu rajtas paroli itale?

– Kia diabla afero estas tio? Mi parolas nur itale.

Do kiun lingvon ni parolu?

– La lingvo de Brazilo estas la portugala. Ĝi ne estas malfacila, mi jam instruos vin, patrino: de nun, vi ne plu diru “pignata” [pinjata = kuirpoto], sed “pinjato” [fakte portugale estas “panela”]. Kaj “pipa” estas “pipo” [fakte “cachimbo” = kaŝimbo]. “Menara” (hakilo) estas “menaro” [portugale “machado” maŝado]. “Vidu, patrino, facile.

– Ma, come se fa tosa? (sed, kiel oni faras “tosa” [toza] : knabino)? Ĉar jam ekzistas toso por knabo?

Mi cerbumis kaj definitive solvis la problemon:

– Inoj finiĝas per a (atentu, verkistoj, tradukistoj, akademianoj: inaj nomoj finiĝas per “a”! – ili meritas escepton!)

Tio estis mia unua leciono kiel instruisto.

Mi ne parolu pri la postaj problemoj lingvaj.

Kaj dekjara oni sendis min en porpastran franciskan seminarion.

Tiu estas “sviso!”

Kiam 12-jara mi fariĝis gimnaziano. Dum la prezento de la novuloj, oni legis mian nomon fuŝe, igis ĝin germana vorto. Ridado salutis min. Tuj poste oni ĉirkaŭis min kaj demandis, ĉu mi estas germandevena.

– Ne, mia avo venis el Svislando, kaj li parolis france, mi estas “sviso”!

– Ho, la-la! Tiu estas sviso!!! Ĉiuj aliaj estis “nur” german- aŭ italdevenaj, kelkaj estis brazilanoj (kia Geraldo Mattos... li reaperos tuj poste).

La teruro estis la latina lingvo. Krome, ĉiujare atendis nin plia lingvo (franca, greka, germana, angla). Post la unua monato ni jam lernis vorton, kiu “akuzis” nin pri stulteco: “akuzativo”. En la portugala,

la malregulaj verboj en senfina parkerado. Lingvoj, fi!!!

Kelkaj kolegoj kaj mi ribeliĝis kontraŭ tiu stato: “Kial tiom da lingvoj? Ĉiuj malregulaj? Ni kreu lingvon facilan, regulan, sen tiaj verbaĉoj! Ride kaj lude ni ekkonstruis nian lingvon. Ek al laboro! Kredu min, samideanoj! Mi havas la honoron prezenti nian lingvon: “Substantivoj finiĝas per -o, adjektivoj per -a, adverboj (laŭ instruo latina) per -e, kaj verboj per nia portugala -ar (fi, ĉu ni estos idistoj?). Kaj vortoj? Vortoj estu nepre belsonaj, el niaj latinaj lingvoj, escepte (se belsone!) el aliaj. Ekzemple: kato, hundo. Jes, ĝuste tiuj vortoj. Ĉu nur tion ĉi mi memoras? Mi bone memoras tion, sed nenion plian.

Ne forpasis tuta monato kaj kolego kiu sidiĝis tie lastloke en la studejo laŭte alvokis nin:

– Hej, vi kiuj volas krei novan lingvon, vi perdis la okazon, jam ekzistas tiu lingvo, jen leciono en la revuo, ĝi nomiĝas Es-pe-ran-to!

Ni alkuris tien kaj... li ne mokis nin, tie ja estis la unua leciono pri Esperanto (ha, kiel belega vorto, aminda!).

Kaj “mi” eklernis ĝin kiam eblis, dum paŭzoj, kaŝe, sekrete... La aliaj lingvo-kreatoroj(?) ne estis tiel entuziasmaj: “Fi! konsonantoj kun supersigno! Fi, akuzativo!”... Sur mia kapo la ĉapeloj bone sidis. Kaj “akuzativon” mi jam lernis en la latina.

En la revuo estis leciono pri akuzativo. Longaj klarigoj, sed finiĝis perverse (mi esperas, ke vi bone legis: per-verse), jene (mi ja parkeris ĝin!): de mia instruisto Pastro José Nogueira Machado [ĵozé novejra maŝado = jozefo juglandarbo hakilo, li ja uzis ĉi kromnomon!)

HISTORIO DE L' AKUZATIVO

En esperantista lando

Loĝis iam bela kato.

Sed malbela, nigra hundo

Nokte vagis sur la strato.

Kaj la hundo mordis katoN.

Kio nun okazis do?

En la vosto de la kato

Restis vundo, tiu N (no).

Kato loĝas en la lando.

Kato nur. Nenio pli.

Sed, se hundo mordas kato....n

Jen la vundo tie ĉi.



*Se la hundo mordas katon,
Se la kato mordas hundon,
Se fratino batas fraton...
Ili ĉiam faras vundon.*

*Kiu batas, kiu mordas,
Tiu estas la aganto;
La mordato, la batato
Estas klare suferanto.*

*En esperantista lando
Suferanto kaj batato
Havas ĉiam vundan markon
De sufero kaj de bato.*

*Tiel post la hunda mordo,
Poste, por la tuta vivo,
La kateto ne forgesis
Uzon de akuzativo.*

Tio estas peka libro, ĝi havas pekan vorton!

La lernantoj estis dividitaj en tri grupoj laŭaĝe. Mi neniam povis renkontiĝi kun Geraldo Mattos, ĉar li apartenis al la plej supera grupo, do ni ne rajtis eĉ interparoli. Li estis fame inteligenta: pri lingvoj, sciencoj, matematiko, muziko... Li voris librojn. Tial la superula pastro eĉ permesis, ke li vizitu la sekretan(?) bibliotekon de la pastroj-instruistoj. Tie li trovis libreton pri Esperanto kaj demandis la pastron: "Kiu parolas Esperanton?" – "La pastro rektoro parolas".

Sed ne estis facile lerni la lingvon per tiu libreto, ĉar ĝi estis en la germana lingvo, kiun Geraldo ankoraŭ ne eklernis. Sed li trovis helpon de kolego germandevena kiu tradukis la germanajn vortojn. Ĝis... ĝis aperis iu diabla vorto: Fräulein.

– Forĵetu ĉi libron, Geraldo, ĝi estas peka libro, ĝi enhavas pekan vorton!

Kion fari? Dum konfesado Geraldo diris al la pastro (kiu ja estis germano), ke li havis pekan libron, kun peka vorto.

- Kie vi trovis la libron?
- En la biblioteko de la pastroj?
- Tute neeble! Kaj kiu vorto estas tiu?
- Fräulein!

La pastro ekridigis tiom laŭte, ke la tuta preĝejo aŭdis... kaj estis ĝoja (senpeka!) ridado.

– Tio ne estas peka vorto, Geraldo, ĝi signifas nur "moça" [mosa] – junulino". Vi estas senpeka, iru en paco!

He-re-zu-lo!!!...

En la dua jaro de mia esperantista vivo, en la revuo ne plu aperis lecionoj, nur kelkaj informoj. Do mi bezonis lernolibrojn. Sed kiel havigi tiujn? Mi mendos sekrete per la poŝto! Se mi petus permeson de la pastro superulo, li ne permesus. Do mi kuraĝis mendi sekrete, kontraŭ la reguloj.

Fine de la tagmanĝo la pastro mem disdonis la poŝtaĵojn (mi ankoraŭ ne lernis la vorton "poŝtaĵo!")... Ĉiuj streĉe atendis leterojn.

Subite la pastro ĵetis antaŭ mi sur la tablon paperaĵojn kaj librojn kaj bleke voĉis:

– HE...RE...ZU...LO !!!

Ne nur mi ektimis, sed ĉiuj en la manĝoĉambro.

Kaj la pastro plu dekretis:

– Transdonu la librojn al la pastro rektoro!

Silente (sed mi emis plori) mi prenis "miajn" librojn kaj iris al la pastro rektoro:

– Pastro Simplicio ordonis transdoni la librojn al vi.

Li prenis la librojn:

– Gramatiko... Vortaro... kaj "Diverskolora Bukedeto", bela libro! Poemoj el 40 lingvoj!

Jes, kedu min, samideanoj, li diris tion en Esperanto!

Renaskiĝis feliĉo en mia koro. Tamen...

– La libroj restos ĉe mi (en la portugala nun), ĉar vi estas malbona lernanto. Kiam vi estos bona lernanto, mi redonos viajn librojn. Konsentite?

Li pravis: mi estis malbona lernanto. Ĉu de nun mi studis pli bone? Nu, jes! Mi fariĝis la unua de la klaso. Kaj la plej bona lernanto de la greka (la rektoro mem estis la instruisto). Do mi kuris al li:

– Miaj libroj, ĉu?

– Gratulojn pri via lernado. Kiel interkonsentite, jen la libroj. Sed plu bone lernu ankaŭ la grekan!

Ha, vi ne scias, kial pastro Simplicio kondamnis min per tiu diabla vorto "herezulo"? Jen la mistero: la libroj estis eldonitaj de ... spiritisma eldonejo. Simple, ĉu ne?



(daŭrigota)

Parto 2



Ĉiupaŝe, ĉiutage
la Dio mem nin gardu!
Venu kaj ni kune Vian
pasintecon rigardu!

Sed vi ne povis atingi
kun ĝi grandegajn celojn.
Maltaŭgis ĝi por detrui,
ekfaligi kastelojn.

Se okazos la mondfino,
tutmonda ĉefelpelo
Disfendite viaj iloj
disflugos kiel ŝelo!

Trapasis... kun la bruoj
ho, kiom da jarcentoj
Trafluis kiom da akvoj
kaj kiom da la ventoj...

Por plenumi tiun planon
por plibonigi fonon
Vi elpensis bizarilon
akuttonan kanonon!

Ĉiu tia inventado —
unu paŝ' al pereoj
Dum pereoj Vin ne helpas
Via peŝ', via veoj!

En histori', ĉiu jarcent'
la militoj ja svarmis
La prauloj Viaj ĉiuj
sin armis kaj sin armis!

Obeinte Vi la estrojn
ordonsimildirantajn
Vi inĝenis pli fortan
armilojn memirantajn.

Ĉu la celo de armiloj
Ĉasi lepor', anason?!
Ĝia ĉefa celo estas:
forigi homamason!

Diversspecajn armilaron
elpensis la genioj
Por forigi la gentaron
Fariĝis inĝenioj.

Memiranta ilo "Tanko"
pafis bone frapante
Tio signifis: inventon
Vi jam faris ne vantel!

Tio estas por la multoj
ignori la devkonon
Por bonigi sian vivon
por multe gajni monon...

Vi senĉese inventis kaj
kreis dum jarmiloj
Aperis novaj, diversaj
kaj mirindaj armiloj.

Por la ĉiu mendo je il'
Vi ne neis, nur jesis
Inventado de armiloj
dum la jaroj ne ĉesis.

Ĉefa pafcel' de l' armiloj
estas la homanimo
Kaj tutmonda tumulto kaj
tutmonda malsat', timo!

Ekaj iloj el la ŝtonoj
Multajn multgapigis
Iom postaj akraj iloj
Multajn senkapigis.

Urĝis afer' kaj aperis
flugante pafantoj
Por Vi iliaj bruadoj
sonoris kiel kantoj!

Maltaŭgas Viaj iloj
se venos Diplago!
Kion diros kaj respondos
Vi en tiu puntago?!

Iom poste Vi ekvolis
armilojn pli fortigi
Ĉefa celo de l' armiloj
estis nur: hommortigi!

Por bombardi grandskale
por malproksimen ĝetoj
Trovegis kun flugil' kaj
senflugilaj raketoj.

Tiutage la HOMAROn
tutestaĵo maldankos
Ne troviĝos iu amik'
Por Vi helpanto mankos!

Poste "saĝaj" en citiloj
elpensis meĉfusilojn
Ĝi bonegplenumis taskon
pereigis la milojn!

Hej, Vi haltu! Alikaze
Dio mem Vin malbenos!
Tuj perdinte ĉion Vi en
Ĉefjuĝejon revenos!

(daŭrigota)



*Solvo de la
krucvortenigmo*

| | | | | | | | |
|-----|----|----|----|-----|----|----|-----|
| KOM | PA | NO | | AB | SO | LU | TE |
| PLI | SI | | BO | NOR | DO | | STA |
| MEN | | MA | LE | MA | | TA | MEN |
| TO | NE | LA | RO | | BO | GO | TO |

(dua parto)

La tutan semajnon pluvis. Ĉiuj senpacience atendis la sunan veteron.

– Laŭ veterprognozisto morgaŭ estus bela suna vetero eĉ ĉi forta ventoblovado ĉesos. – diris patrino dum tagmanĝo.

– Fine ni povas organizi ekskurson! - diris patro laŭtvoĉe rigardante la ridon sur la lipoj de sia edzino.

– Jes, vere ni povos ion fari, fakte mi preparos ĉion por la ekskurso al la vilaĝo de viaj gepatroj. Ĉu ni vojaĝos trajne aŭ aŭte? – demandis la patrino la edzon.

Ŝi estis kontenta ĉar ili vizitos avinon Mara, la patrinon de sia edzo. Ŝi estas babilema sed ŝi tre amis la filon, Petron, ekpensis la edzino.

Laŭtvoĉe ŝi aldonis:

– Miaopinie estos bone por Petro vidi avinjon Mara kiu volonte montros al li kiel aspektas la vilaĝana ĉiutageco.

Petro estis tre feliĉa ĉar li tre amis sian avinjon Mara sed ankaŭ li tre amis vojaĝi per trajno. En la vilaĝo loĝas multaj parencoj de la familio tute nekonataj al li. Ja, mi havas nur kvar jarojn.- ekpensis li

Ho! Kia bele estos travivaĵo vojaĝi trajne. Li sidos ĉe la vagonfenestro rigardante kiel rapide pasas la belaj pejzaĝoj. Mi estos svingonta al la homoj starantaj sur la kajo .

– Ho! Kiom feliĉa mi estas, panjo... kiun tagon ni ekskursos? - demandis Petro la patrinon tre emocie.

Estis Sabato, la tago markita por ekskurso. Petro ellitiĝis frumatene jam formanĝis la matenmanĝon kaj senpacience atendis la patrinan alvokon por kune ekiri al la trajna stacidomo. La patro jam foriris por aĉeti biletojn.

Subita sonorilado prenis lin el vojaĝa revado.

– Kiu estas nun? La patro... Sed kial li sonorigas? Ja li havas domŝlosilon - diris la patrino surprizite.

Dume Petro kuris por malfermi la domopordon. Malfermite la pordon li estis surprizita vidinte la plorantan knabinon. Ŝi staris sur la domosojlo ankoraŭ ploranta.

– Bonan tagon, knabineto, kara – diris la patrino tenere... Kiu vi estas?

– Mmi. mmi estas... denove ŝi esploris forte. Ŝia nazo fluis pro la ploro kaj la okuloj ruĝiĝis. Ŝi levis la kapon serĉante la okulojn de la patrino de Petro, kvazaŭ ŝi volus diri – Helpu min! - Ŝi apenaŭ eldiris..

– Mi perdiĝis! plorvoĉe ŝi klarigis.
– Ho, trankviliĝu kara. Kiel vi nomiĝas? – provis la patrino eksci sian nomon

– Mi estas Jana. Mi estis kun mia avinjo. Ŝi eniris bazaron dum mi atendis ŝin eksteren.

– Ja, kio okazis poste... nu, parolu diris la patrino iomete maltrankvile.

– Poste mi vidis belan blankan hundeton ligita al la trunko de tilio. Iu avo plukis foliojn de tilio. Poste li foriris kaj min allogis montrofenestroj kun belaj grandaj pupoj. Jana faris paŭzon por viŝi siajn larmojn fluantaj sur ŝia vizaĝo kaj daŭrigis la rakonton...

– Poste mi vidis sur la vendotabloj surtablitajn florpotojn kaj mi iris flari ilin ĉar ili tre bonodoris. Kaj mi... mi ne scias kiel mi trovis min en via strato. Mi vidis, ke la pordego estis malfermita kaj mi eniris... Ja, tio estas ĉio... ĉu vi povas helpi min?

– Jes, kompreneble, diris la patrino aldonante: Ne ploru pli. Diru al mi kie vi loĝas. Ĉu vi scias en kiu kvartalo troviĝas via loĝejo aŭ apud kiu konata konstruaĵo – demandis la patrino ankoraŭ maltrankvila.

– Jes, mi scias, mia loĝejo estas alta... je ĉiuj fingroj oni povas nombrumi la etaĝojn! Jes mi memoras apude troviĝas skiterenoj – senspire klarigis Jana. Unuafoje oni vidis rideton sur ŝia ploranta vizaĝo.


– Oh, bonege. Ni solvis la problemon. Tuj mi telefonos al la edzo, por ke li iru al Kraljevica kvartalo por pridemandi homojn pri viaj gepatroj. Kaj via avinjo nomiĝas... – la patrino faris paŭzon... – Marta – laŭte diris Jana feliĉe etendiĝante la manojn al Petro.

– Tre bone Jana – diris Petro. Ne timu plu mia patro trovos ilin kaj ni kune revenigos vin hejmen, ĉu ne panjo? – diris Petro feliĉe pro la kaptita okazo neatendite gajni amikinson.

La patrino de Petro milde karesis ŝian nigran hararon. Petro kaj Jana sidis komforte eltrinkante sukon kaj manĝante bongustajn kuketojn.

– Petro, filo mia, ĉu vi ne bedaŭras pro la hodiaŭa via perdita ekskurso? – demandis la patrino ride al sia filo.

– Ne, panjo, mi hodiaŭ gajnis belan amikinson. Ni ekskursos alian tagon sed amikeco estas pli valora – diris Petro forte tenanta la manon de Jana.



(Fino de la dua parto)

Kŭĉios

Kŭĉios (Ku'ĉos) – tiel litovoj nomas la Kristnaskan antaŭvesperon, 24-an de decembro. Tiu vespero estas la plej bela momento de anima koncentriĝo de litovoj. La homoj rememoras, kio jam estas farita kaj kun espero kaj kredo atendas la naskiĝontan Savanton kaj la venontan jaron. Tiu festo respegulas principojn de popola moralo, strebon al belo kaj bono. Tio estas la popola tago de Dankesprimio, la tago de interna ligo inter homoj, la tago de anima fortiĝo.

Dum la Kristnaska antaŭvespero la tablo ludas gravan rolon. Kiam vesperiĝas, kiam estas jam ordigitaj la ĉambroj, la familio revenas de la banejo, sin vestas per festaj vestaĵoj kaj prepariĝas veni al la tablo. Komence venas la mastro portante iom da fojno. En familio tion faras la patro aŭ avo. Li kovras ĝin per pura, aŭ nova tablotuko. Tiam la mastrino meze la tablo metas kruceton, oblatojn, kaj la patro – pecetojn de tranĉita pano. Poste sub gvidado de patrino la plej aĝaj filinoj dismetas festajn manĝaĵojn. Ĉiam, laŭ la moro, devas esti 12 manĝaĵoj. Onidire tio simbolas dek du disĉiplojn (apostolojn) de Kristo, aŭ dek du monatojn de la jaro. Estas ankaŭ opinio, ke je la 12-a horo nokte naskiĝis Jesuo. Tamen la kvanto de la manĝaĵoj ne estas nepre dek du.

Super la tablo oni pendigas ornamaĵon el pajlo. En la ĉambro ofte staras ornamita Kristnaska arbeto – abieto, brulas kandeloj.

La familio sidiĝas ĉe la tablo post la apero de Vespera stelo, proksimume je la 7-a - 8-a horo vespere. Estas ankaŭ kutimo inviti al la tablo solulojn, senfamiliajn najbarojn. Meze la tablo oni starigas kaj bruligas kandelon. Ĝi simbolas Stelon de Bet-Leĥemo, kiu anoncas la venon de Kristo. Ĉiuj familianoj sidiĝas ĉe la tablo en specifaj lokoj. La geavoj kaj gepatroj sidiĝas tiu flanko, kie sur la muro pendas sanktaj bildoj. Oni metas sur la tablon telerojn ankaŭ por mortintaj, enprizonigitaj, ekzilitaj aŭ forestaj familianoj. En tiujn telerojn oni metas branĉeton de abio, mirto aŭ ruto kaj peceton de oblato. La preĝojn ĉe la tablo laŭkutime komencas la patro. Oni preĝas starante, preĝas por tiuj, kiujn oni rememoras, por vivantoj kaj mortintoj.

Post la preĝado oni rompadas oblatojn, dezirante unu al la alia sanon, sukcesojn en ĉiuj aferoj, feliĉon en la venonta jaro. Post la manĝado de oblatoj patrino petas ĉiujn manĝi aliajn manĝaĵojn el pizoj, fazeoloj, el diversaj fiŝoj, legomoj, fungoj. Estas ankaŭ dolĉaj manĝaĵoj, diversaj bakaĵoj, faritaj el faruno, konfitaĵoj. La ordo de la manĝado estas libervola, tamen

unuavice oni komencas de salitaj manĝaĵoj kaj finas per la dolĉaj, precipe per papava lakto.

La ĉefaj manĝaĵoj en tuta Litovio tiuvespere estas prĕskuĉiai (bakitaj farunbuletoj) kun papava lakto, haringo, fiŝoj, manĝaĵoj el fungoj, pizoj, tritikaj grenoj, terpomoj. Mankas viando, ĉar kŭĉios estas fasta tago. Ĉiuj manĝaĵoj havas sian signifon, kiu ne estas precize esplorita. La ĉefaj manĝaĵoj de tiu vespero havas sencion biblian aŭ de antikva popola mondkoncepto. Ekzemple, pomoj simbolas Edenan arbon, pizo – la forpelon de Adamo kaj Eva el Paradizo, tritikaj grenoj – ekonomiecon, mielo – lumon kaj sanon, pano kaj kuko – fortecon, fidelecon, bonkorecon.

Ĉe la tablo oni parolas malmulte kaj trankvile, parolas pri Kristnasko, naskiĝo de Jesuo, pri familiaj okazaĵoj dum la pasinta jaro. Fininte la manĝadon oni kisas la kruceton sur la tablo, dankas al Dio pro la donitaj manĝaĵoj; infanoj dankas al gepatroj pro la vespermanĝo, hejma komforto, la gepatroj deziras, ke ili elkresku sanaj kaj saĝaj, estu obeemaj, kaj interkisas unuj la aliajn. Poste oni denove preĝas por la mortintoj. La manĝaĵojn oni restigas sur la tablo dum la nokto, kredante, ke tiunokte venos vespermanĝi la animoj de la praavoj kaj de aliaj mortintaj familianoj.

Post la vespermanĝo ankoraŭ neniu iras dormi. Komenciĝas diversaj sorĉadoj kaj divenadoj. Oni eltiras el sub la tablotuko fojnerojn kaj laŭ ties longeco aŭguras la longecon de sia vivo. Junaj kaj maljunaj homoj iras en la korton, rigardas al la ĉielo, observas stelojn, nubojn, neĝon sur la bariloj, divenas la estontecon kaj la sorton.

Precipe la junularo atendas la noktomezon. Oni diras, ke tiam en la puto la akvo fariĝas vino, ke la hejmaj bestoj en la staloj parolas homvoĉe. La fraŭlinoj aŭskultas, en kiu flanko bojas hundoj – de tie venontjare povos veni svatantoj. La sorĉado daŭras ĝis la mateniĝo.

El diversaj signoj oni divenas la veteron de la venonta jaro. Ekzemple, se dum Kristnaska antaŭvespero la arboj estas prujne kovritaj, tiam la venonta jaro estos pluvabunda. Se neĝas, tiam venontjare estos bona rikolto. Se ne estas neĝo, tiam la printempo venos malfrue. Se blovas norda vento – estos malvarma somero; se la vento estas forta, la somero estos humida. Oni frapas la abeluojn, vekas la abelojn, ke ili somere estu laboremaj kaj ne forflugu. Aŭgurado de la estonteco estas populara en tiuj familioj, kie estas multe da junaj homoj. Kiam ekkrias

